
# EL POPOLA ĈINIO

10
1977

中國報道





Celebro de venko

# Kora prizorgo

Prezidanto Maŭ Zedong intime interparolis kun armeanoj dum sia inspektado al artileria trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en 1960.






Prezidanto Hua Guofeng intime manpremis kun milicianinoj dum sia inspektado al laborista-kamparana vilaĝo de Daking en la 18-a de aprilo, 1977.

En 1965 Ĉefministro Ĝoŭ Enla
akceptis aerarmeajn meritulojn d
la Ĉina Popola Liberiga Armeo

Prezidanto Ĝu De intime manpremis kun soldatoj dum sia inspektado al mararmea trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en aŭgusto de 1974.







Vicprezidanto Je Gianjing pririgardis pafekzercan aparaton de aviadilo dum sia inspektado al aerarmea trupo en junio de 1961.



Vicprezidanto Deng Hiaŭping rigardis militan ekzercadon de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en junio de 1964.

# Ĉiamvenka popola armeo

50 jaroj jam forpasis de la Nanĉang-a Leviĝo je la l-a de aŭgusto en 1927, en kiu la Ĉina Popola Liberiga Armeo fondiĝis kaj faris la unuan pafon al la reakciuloj de Kuomintango.

Subaj fotoj montras, ke en la pasinta duona jarcento, sub la brila lumado de la milita penso de Prezidanto Maŭ Zedong, tiu popola armeo kreskadis kaj jam fariĝis firma subtenilo de la diktaturo de la proletaro.

La foto montras trupon de la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en batalo kontraŭ "ĉirkaŭekstermo" en sia komenca periodo.





La foto montras parton de la Ruĝa Armeo alvenintan al norda Ŝenhi post la Longa Marŝo.




Soldatoj de la Okavoja Armeo en studo de revolucia teorio.






La Okavoja Armeo batalas ĉe la Granda Muro kontraŭ japanaj agresantoj.



La Nova Kvara Armeo persistanta en rezistado kontraŭ la japanaj agresantoj en la baseno de Jangzi-rivero.



La armeo kaj popolo en la kontraŭjapana bazloko disvolvas produktan movadon.



Rememoro pri suferoj de la malnova soci
en la nova arme-ordiga movado.



La foto montras armeanojn de la Ĉiangkajŝek-a bandita armeo kaptitajn de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Huajhaj-kampanjo.









La popola armeo atente protektas plantajojn dum militiro.



a foto montras, ke trupoj de la
beriga armeo marŝas en Bejping
ɔst la Bejping-Tiangin-a Kampan-
ɔ.




La liberiga armeo furioze atakas la malamikojn defendantajn la urbon Ginĝoŭ en la Liaŭning-Ŝenjang-a Kampanjo.



Liberigitaj kamparanoj sendas siajn
karulojn al la popola liberiga armeo.

La ĉinaj volontuloj transiras Jalu-riveron por rezisti kontraŭ
la usonaj agresantoj, helpi Koreion kaj defendi la patrolandon.



EL POPOLA ĈINIO
中国报道

1977
N-ro 10
(229)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

P. 1. Koro de la avino

P. 4. Kiosko Canglang de Suĝoŭ



## Enhavo

Vizito al la "Malmolosta Sesa Kompanio" . . . . . 2

Vojaĝo de la loko de la Aŭtuna Leviĝo ĝis Ginggang-montaro . . . . . . . . . . . . . . . . 8

La Nanĉang-a Leviĝo je la Unua de Aŭgusto . . . . 13

Kadroj en konstruado de Daking-olekampo . . . . . 17

Tangŝan unu jaron post la tertremo . . . . . . . 21

La nigra bando el kontraŭrevoluciuloj . . . . . 25

Labora Kuveno de la Ĉina Akademio de Sciencoj . . 29

Sekreto de la Kinghaj-Tibeta Altebenajo . . . . . 31

ĈINAJ NACIECOJ: La hanioj . . . . . . . . 36

EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Agresoj de la cara Rusio kontraŭ Ĉinio . . . . . . . . . . . 38

TEATRAĴOJ KAJ FILMOJ: "Ora Sovaĝansero" . . 41

KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . 30, 43

HJUE VU:

# Vizito al la "Malmolosta Sesa Kompanio"

ANTAŬ nelonge prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hua Guofeng kaj ĝia vicprezidanto Je Gianjing faris alvokon al la Ĉina Popola Liberiga Armeo, ke ĝi lernu de la "Malmolosta Sesa Kompanio".

Lastatempe mi vizitis tiun kompanion. En nelonga kunvivado kun ĝiaj oficiroj kaj soldatoj mi iom konis ĝian spiriton.

### KION SIGNIFAS "MALMOLOSTA"

En la tago de mia alveno al la nomita kompanio mi rigardis ĝian "Ekspozician Ĉambron de la Kompania Historio", kie elmontriĝas objektoj, honoraj flagoj, medaloj, fotoj, grafikaĵoj k.a. registrantaj ĝian batalan historion.

La kompanio estis unuo sub la komando de la forpasinta vicĉefministro Kamarado He Long kaj fondiĝis en la kontraŭjapana batalkampo de centra Hebej en 1939. Ĝi spertis la Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la enlandan Liberigan Militon, kaj parto de ĝi partoprenis en la kontraŭusona milito por helpi Koreion kiel volontuloj. Ĝi sume eltenis pli ol 70 relative grandajn batalojn kaj kulturis nombron da eminentaj batalantoj inkluzivantaj pli ol dek batalajn heroojn fame konatajn de la tuta lando, kaj per tio ĝi faris grandegan kontribuon por la liberiga afero de la ĉina popolo. Prezidanto Maŭ Zedong, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Ĉefkomandanto Ĝu De kaj aliaj gvidantoj akceptis kaj laŭdis la oficirojn kaj soldatojn de tiu kompanio. En 1964 la Nacidefenda Ministerio oficiale nomis ĝin "Malmolosta Sesa Kompanio".

Tamen oni komencis tiel nomi ĝin ne en tiu jaro. En la 38 jaroj post sia fondiĝo la sesa kompanio bataladis tra pli ol duona Ĉinio kaj ĉiam plenumis la principon de la popola armeo difinitan de Prezidanto Maŭ — tutkore servi al la popolo. Ĉie, kien ĝi venis, la popolamasoj ĝin bonvenigis kaj laŭdis. Frue en la jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito la popolo nomis ĝin "malmolosta trupo" kaj "malmolostaj batalantoj". Kvankam poste ŝanĝiĝis ĝiaj membroj, tamen ĝia batalvolo kaj laborstilo ne ŝanĝiĝis kaj ĝia tradicia spirito de servado al la popolo ankoraŭ pli disvolviĝis. Tial la sesa kompanio ĝuas renomon tra la tuta Ĉinio.

En Ĉinio "malmolosta" estas de ĉiuj komprenebla vorto entenanta respekton kaj laŭdon. Ekzemple, Prezidanto Maŭ Zedong jene laŭdis S-ron Lusin: **"Lusin estis homo kun plej malmolaj ostoj kaj sen ombreto da sklava mieno aŭ flatemo; kaj tio estas la plej valora kvalito por la koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj."**

En militiro



## SENLIMA FIDELECO AL LA POPOLO

"Ĉu la kompanio ricevis tiun nomon nur pro tio, ke ĝi estis ĉiamvenka kaj povis plenumi malfacilan taskon de batalo?" mi demandis.

"Ne, ne tute pro tio," diris Ŝi Ŝoŭde, la antaŭa politika direktanto de la sesa kompanio kaj nun politika komisaro de regimento. "Kompreneble la armeo devas esti lerta en militado, tamen tio estas nur unu flanko. Por la ĉina armeo lerta militado ne sufiĉas, ĝi devas esti bona ankaŭ en politiko, ideologio, disciplino, laborstilo kaj ekzemplodonado al la popolamasoj."

Iun tagon mi prenis tagmanĝon kune kun soldatoj de la sesa kompanio. Mi vidis, ke ĉe apuda manĝotablo sidas kelkaj kamparanoj akompanataj de la kompaniestro kaj politika direktanto. Mi konjektis, ke ili estas soldataj familianoj, kiuj venis al la trupo por vidi siajn filojn. Post demando mi sciis, ke ili estas komunumanoj de najbara produkta brigado. Iu soldato diris al mi, ke ili tenas rilaton kun ĉiuj proksimaj produktaj brigadoj. La oficiroj kaj soldatoj ofte elprenis tempon por labori en tiuj brigadoj, aŭ kune kun komunumanoj studi politikojn de la Partio kaj la ŝtato, diskuti gravajn aferojn de la mondo aŭ sin amuzi. Ankaŭ la komunumanoj ofte gastis en la kompanio. Ili kune kun komunumanoj kulturis en brigado pecon da rizkampo nomata "Amikeco inter Armeanoj kaj Popolanoj". Kompreneble la laboro de la armeanoj estas senpaga kaj ĉiuj rikoltaĵoj apartenas al la kamparanoj.

Batalantoj de la "Malmolosta Sesa Kompanio" diris, ke ĉio de ili farita estas por servi al la popolo.

En iu aŭtuna nokto superakvo atakis popolan komunumon apud la kazerno de la sesa kompanio. Informiĝinte pri tio 13 soldatoj el la kompanio tuj rapidis laŭ ordono al la loko. Je la kvina horo posttagmeze de la sekvanta tago ili eldanĝerigis la vilaĝanojn post kontinua klopodado de 18 horoj.

Ĝuste tiam ili rimarkis, ke 10-jara knabino plore kriis, ke ŝi ne trovis siajn patrinon kaj fraton kaj ili certe estas ankoraŭ en la vilaĝo.

La soldatoj decidis tuj iri serĉi ilin malgraŭ ilia granda laciĝo. Subplotonestro Pi Guangjaŭ elektis tri fortajn soldatojn krom si mem por plenumi tiun taskon. Li diris: "Se nur estos iomete da espero, ni nepre trovos ŝiajn patrinon kaj fraton."

Post pridemando pri la situo de la vilaĝo kaj iliaj nomoj ili ekiris. Ili kuris laŭ la digo kvar kilometrojn kaj naĝis ĉirkaŭ unu kilometron. Tiam jam krepuskiĝis, ili povis nur laŭte voki kaj fine trovis ilin sur tegmento de iu nefalinta domo.

Ili faris floson el pordotabulo, transportis la trovitojn sur ĝin kaj antaŭenpuŝis ĝin stabile. Per la tuta energio ili batalis malfacile kontraŭ vento kaj ondoj por ne ŝanceli la floson kaj fine albordigis ĝin ĉ. la naŭa horo vespere. La tri elsavitoj de la familio ĝoje renkontiĝis, tamen apenaŭ la kvar soldatoj surbordiĝis, ili ĉiuj falis teren kaj unu el ili eĉ svenis.

La 13 soldatoj gardis la lokon ĝis kiam la akvego malaperis kaj la amasoj eldanĝeriĝis.

En la kompanio ni aŭdis multajn similajn aferojn, kiuj vivece montris sinoferemon kaj senliman fidelecon de nia armeo al la popolo.

## INTER LA OFICIROJ KAJ SOLDATOJ

En la kunvena ĉambro de la sesa kompanio pendas paperpeco kun la elegante skribitaj vortoj "Ok Postuloj pri Amo de Oficiroj al Soldatoj". Inter tiuj postuloj estas doni bonan ekzemplon al



*Studo de verkoj de Prezidanto Maŭ*



*Klarigo al la batalantoj pri la internacia situacio*

soldatoj en ĉiuj agoj; respekti iliajn demokratiajn rajtojn, modeste aŭskulti iliajn opiniojn kaj ne sin venĝi kontraŭ ili pro kritiko; manĝi, loĝi, militekzerci, fiziklabori kaj sin amuzi kune kun soldatoj, ne ĝui privilegion nek sin teni kiel sinjoro; bone zorgi la materian kaj kulturan vivon de soldatoj, ne atenci iliajn interesojn k.a.

Mi demandis la kompaniestron: "Ĉu tiuj ok postuloj estas difinitaj de la supera instanco?" Li respondis: "Ne, ili estas difinitaj de la oficiroj kaj soldatoj de la tuta kompanio post diskutado."

Kiel skribite sur la paperpeco ili estas observataj en praktiko.

En la ekzercejo de la sesa kompanio oni ofte povas vidi kortuŝajn scenojn. Dum militekzercado oficiroj, same kiel soldatoj, rampas, palpas, ruliĝas kaj luktas, kaj oni tute ne povas distingi kiu estas oficiro kaj kiu soldato. Por lernigi ĉiun teknikon aŭ movon oficiro pacience faris plurajn, eĉ dekkelkajn demonstrojn. Tie neniam okazis insulto aŭ bato de oficiroj al soldatoj.

Foje en grenadojetado iu rekruto ĵetis sian grenadon en lokon nur 6 metrojn fore de li pro nelerteco kaj timo. La grenado ellasis fumon. Tuj antaŭ la eksplodo la kompaniestro Lin Jiping pafiĝis al li. Li puŝis la soldaton en apudan kavon kaj lin ŝirmis per sia korpo. Eksplodis la grenado, saviĝis la rekruto kaj malgrave vundiĝis la kompaniestro. Tiaj aferoj multe okazis en la kompanio kaj tiu kompaniestro jam kvarfoje tiel savis soldatojn.

La oficiroj de la sesa kompanio tre bone konas siajn soldatojn, eĉ iliajn karakteron, interesojn, kutimon kaj familion. Ili persone flegas malsanajn soldatojn kaj ĉiamaniere helpas tiujn kiuj havas malfacilojn en familio aŭ en ideologio.

## MEMKONSCIO

Iun tagon Vickompaniestro Liu Guangtian kun kelkaj soldatoj sub sia gvido iris aliloken por plenumi taskon. Ĉe la fervoja stacio li renkontis sian edzinon, kiu alveturis por vidi lin. Li tiris ŝin flanken kaj diris al ŝi, ke li devas iri plenumi taskon kaj ne povas tuj reveni, kaj ke ŝi hejmenrevenu post kelktaga loĝado en la kompanio. La edzino bone komprenis la edzon kaj trankviliĝis lin.



*Ekzercado*

Li kaj la kamaradoj ascendis la vagonaron. Iu soldato demandis lin: "Kiu estas la kamaradino kiu ĵus interparolis kun vi?" "Mia edzino," li diris kun serena rideto. Aŭdinte tion la soldatoj lin kritikis kaj iu diris: "Via edzino venis de malproksima vilaĝo por vin vidi, kial vi ne zorgas pri la 'rilato inter la armeo kaj la popolo'?" La vickompaniestro ridetis denove kaj diris: "Mi akceptas vian kritikon kaj mi certe invitos ŝin gasti ĉe ni post kiam ni plenumos la taskon."

Liu Guangtian mem kredis, ke se li telefonus de la stacio al superulo de la trupo, la lasta eble tuj sendus alian por lin anstataŭi. Tamen li ne tiel faris opiniante ke pli grave estas plenumi la taskon.

Aliafoje, la sesa kompanio veturis al iu loko por plenumi taskon. Tagmeze, la trajno haltis ĉe iu stacio por ke ĉiuj prenu tagmanĝon kaj ripozu. La hejmo de la soldato Duan Juming estas en laborista loĝkvartalo nur 200 metrojn fore de la stacio. Li jam klare vidis la domon de sia hejmo, la arbegon antaŭ la domo kaj konatajn homfigurojn sub la arbo, kaj krome la tempo tute sufiĉis por li vidi siajn familianojn, tamen li ne descendis la vagonaron.

Kamaradoj demandis lin: "Kial vi ne hejmeniris? Ĉu vi ne sopiras vidi viajn patrinon kaj fratinon?" Li respondis: "Kial mi ne sopiras? Tamen mi ne devas tiel fari. Antaŭ unu jaro, ĝuste sur tiu stacio la tuta familio adiaŭis min. Mia patrino fojerefoje admonis, ke mi ne vanigu la esperon de la Partio kaj la popolo. Nun mi estas plenumanta taskon, kiel mi povas hejmeniri? Se mi tion farus, mia patrino certe min kritikus pro forlaso de la posteno."

Se tiel kondutas la individuoj, kiel kondutas la kolektivo?

Antaŭ nelonge la sesa kompanio partoprenis en ekzerco de longa marŝado. Iun nokton kiam la trupo atingis vilaĝfinon, ĝi ricevis ordonon bivaki tie. Kiel bivaki sur humida tero en frosteta frua printempo post pluvo? Tamen je la ordono la soldatoj duope kuŝiĝis sur unu pluvmantelo kaj sin ŝirmis de prujno per alia. La tuta kompanio estis en plena silento dum la nokto. Matene de la sekvanta tago, rimarkinte ke la ĈPLA-anoj tranoktis sub la ĉielo, kamparanoj de la vilaĝo tre maltrankviliĝis. Ili ameme diris, ke ĉiu familio povas malokupi unu aŭ du litojn por la soldatoj. Kaj krome sur la draŝejo de la vilaĝfino ĉie estas rizpajlo kaj estus pli komforte dormi sur ĝi!

Kiel la soldatoj pensis pri tio? Ili ne volis ĝeni ripozon de la komunumanoj nek uzi iliajn objektojn sen permeso.

Pi Guangjaŭ, kiu estis respektata de kamaradoj pro sia modela ago kaj nun fariĝis vicbatalionestro, diris al ni: "La armeo ne povas ne havi disciplinon, tamen ni emfazas memkonscion, t.e. memkonscie observi disciplinon. Ni ĉiam opinias, ke ĉiu batalanto devas havi klasan konscion, kaj kuraĝigas ilian iniciativon. Ni oponas kontraŭ sklavismo kaj blinda obeemo. Se soldatoj montras, ke nia ordono aŭ instrukcio ne estas ĝusta, ni ĝin korektas kaj tiamaniere nia afero povas esti bone farata.

## RIGORA EKZERCADO

La sesa kompanio estas rigora al si en milita ekzercado. Multe oni rakontis al mi pri tio kaj mi rigardis ilian militan manovron.

Tiun tagon ĉesis torenta pluvo, tamen ankoraŭ pluvetis kaj ĉie estis akvujetoj. Baldaŭ komenciĝos la milita manovro de la sesa kompanio. Kiel rigardantoj de la manovro ni malfacile grimpis kune kun aliaj sur iun monton. Eble oni demandus: "Ekzercado ne estas vera batalo, kial oni ne elektus bonan veteron por ĝin fari?" Iu oficiro akompananta nin eksplikis la kialon. "La armeo ofte diras, ke la ekzercado estas por batalo. Nun ni ekzercas nin en batalarto por rezisti kontraŭ agresa milito. Ĉu milito okazos nur en bonaj tagoj? Tial oni devas esti rigoraj al si en malfacila militekzercado."

Komenciĝis la manovro kaj signalkuglo fendis la nebulan ĉielon. La batalantoj de la sesa kompanio, kvazaŭ abrupte aperis el la tero, rapide sin ĵetis al sennoma altaĵo. Ili formis intensan fajran reton per diversaj armiloj por pafi la atakantajn "malamikajn" aviadilojn, ekstermis iliajn paraŝutajn soldatojn, eksplodigis ilian minan terenon, detruis pikdratojn kaj ruinigis iliajn tankojn per kontraŭtankaj raketoj. En densa fumo la batalantoj sturmis "malamikajn" tranĉeojn kaj venke ascendis la altaĵon.

Ŝajnis al ni, ke jam finiĝis la batalo. Subite desur la altaĵo aŭdiĝis obtuza eksplodo. La "malamikoj" faris "reatakon" kaj ellasis venenan gason. Nerimarkite la batalantoj jam surmetis gasan maskon. Ili kuris kaj pafis en blanka nebulo, forigis aron da "malamikaj" minoj kaj bruligis iliajn tankojn.

## KAZERNO — LERNEJO

La rododendroj sur la monto estis vualitaj de noktaj nebuloj, kaj lampolumoj en la kazerno brilis kiel steloj sur la ĉielo. Kontraste kun la streĉa kaj arda atmosfero de la ekzercejo, plena silento regas tiam en la loĝejoj de la sesa kompanio kvazaŭ en legoĉambro de universitato. Iuj el la soldatoj kaj oficiroj legas kaj aliaj skribas. Mi iris al Gaŭ Hanfang, direktanto de la studa grupo de la kompanio kaj li afable diris, ke laŭ la regularo ĉiusemajne la sesa kompanio havas certan tempon por studi politikon, kurantajn aferojn kaj kulturon, kaj vespere ili mem studas

aŭ partoprenas en amuza aktivado.

Gaŭ Hanfang tre ŝatas legi. Kiam mi petis lin paroli pri sia spertaĵo, li diris, ke en la komenca periodo post sia rekrutiĝo li opiniis, ke sufiĉas por soldato havi bonan militan arton kaj volon servi al la popolo. Poste dank' al helpo de la partia filio de la kompanio kaj kamaradoj li altigis sian konon.




*Laŭ invito la batalheroo Jin Jufen (meze) en militaj jaroj revenis al la kompanio por lernigi batalarton.*

Li diris: "'Armeo, analizite ĝis la fino, estas nur armita kolektivo plenumanta politikan taskon,' kio estas dirita de Prezidanto Maŭ. La burĝaro intence neis tiun fakton kaj distrumpetis superklasan tutpopolan armeon, tio ja estas por trompi la popolon. En lando, kie estas milionuloj kaj neniohavantaj proletoj kaj estas privilegiaj klasoj kaj ankaŭ subpremataj kaj ekspluatataj popolamasoj, ne povas esti 'tutpopola' armeo! Ni malkaŝe konfesis, ke la Ĉina Popola Liberiga Armeo estas armitaj fortoj plenumantaj politikajn taskojn de la Komunista Partio de Ĉinio.

"Por bone koni tion, ĉiu revolucia batalanto devas diligente studi politikon, kulturon kaj marksisman-leninisman teorion kaj altigi sian klasan konscion. Ja ne sufiĉas nur lerni militan teknikon. Krome por bone manipuli modernajn armilojn kaj posedi modernajn teknikojn ni devas diligente klerigi nin!"

Nerimarkite jam estis tempo por enlitiĝo kaj nia interparolo devis ĉesi. Ekstere de la kazerno la luno kaj steloj brilis sur la ĉielo kaj freŝa venteto tre agrabligis. Mi estis en plena ĝojo kaj ĉe miaj oreloj ankoraŭ sonis la klara kaj pasia parolo de tiu juna subplotonestro. Jen estas nia Ĉina Popola Liberiga Armeo, la firma kolono de la diktaturo de la proletaro.

*La Malmolosta Sesa Kompanio*



VANG JUANGIAN:

# Vojaĝo de la loko de la Aŭtuna Leviĝo ĝis Ginggang-montaro

(Daŭrigo)

## HEJMO

Forlasinte Sanvan, nia aŭto sin direktis orienten kaj grimpis supren laŭ la zigzaga montvojo.

Ĉe la fame konata pasejo Huangjanggie ni elaŭtiĝis kaj post ni haltis alia aŭto, el kiu iris mezaĝa paro kaj aminda knabino. Ili estas filo, bofilino kaj nepino de frutempa batalanto de Ginggang-montaro Kamarado Maŭ Zetan, frato de Prezidanto Maŭ. La viro manpremis kun mi kaj diris: "Mi venis por rigardi la hejmon."

Hejmo, kiel trafa kaj kora vorto ĝi estas! Ĝi montris la signifon de Ginggang-montaro en nia koro.

Mi staris ŝultro ĉe ŝultro kun la parencoj de Prezidanto Maŭ sur la pasejo kaj kun senlima amo rigardis la hejmlokon de la revolucio. La majestaj kaj belaj montpintoj antaŭ ni estas vualitaj de blankaj nuboj kaj krutaj rokmuroj staras unu post alia. Vere impona estas Ginggang-montaro!

La nomita montaro situas ĉe la limo de la provincoj Gianghi kaj Hunan kaj havas longecon de 275 kilometroj. En la montaro troviĝis multaj grandaj kaj malgrandaj vilaĝoj, kie la trupoj povis garnizoni kaj ripozi. Krome, la loko taŭgis por atako kaj sindefendo. Ĉirkaŭ la montaro estis riĉa natura ekonomio, tial la trupoj povis esti sufiĉe provizitaj. Estis pli grave, ke tiea batalo povis influi la vastan areon de la du provincoj kaj akceli la revolucion.

Vespere de profunda aŭtuno, Prezidanto Maŭ kun kelkcent soldatoj sub sia gvido ascendis monton laŭ zigzagaj montvojetoj post multaj malfacilaj bataloj por establi hejmon en tiu profunda montaro kun densaj arbaroj. Ĝi ne estis ordinara hejmo, sed hejmo de la revolucio de la tuta Ĉinio. Ĝi estis revolucia lulilo uzata de Prezidanto Maŭ por flegi la junan revolucian armeon; ĝi estis granda kaj sukcesa "eksperimentejo" por disvolvo de la revolucia afero kaj startpunkto de la revolucio por kapti la tutlandan venkon.

Trovi por la revolucio hejmon, por ke la ruĝarmeanoj longe militantaj kun sandaloj sur la piedoj havu hejmon, t.e. okupi pozicion en kamparo por disvolvi gerilan militon kaj lerte kombini arman batalon, agraran revolucion kaj fondon de revolucia bazloko, kio estas la centro de la strategia penso de Kamarado Maŭ Zedong en la komenca periodo de la revolucio kaj estas lia granda kreaĵo en kombino de Marksismo-Leninismo kun la ĉina revolucia praktiko.

Kompreneble, siatempe la batalantoj ne tuj komprenis la grandan signifon de tiu revolucia hejmo.

Antaŭ kelkaj jaroj mi informiĝis de tiutempa kompania partia reprezentanto pri rakontado de Prezidanto Maŭ pri Ginggang-montaro.

Estis mateno de aŭtuno. La trupo kolektiĝis ĉe la norda montpiedo kaj Prezidanto Maŭ ekparolis pri ĝi. Li diris: Iuj el ni enuiĝis pro grimpado de Ginggang-montaro kaj volas iri al urboj, tiu penso estas erara. Oni devas scii, ke kvankam la montaro frotvundis niajn piedojn kaj lacigis niajn gambojn, tamen post multfoja

grimpado ni povos ekstermi la malamikojn. Tial la montaro estas revolucia.

Parolante pri la rilato inter bazloko kaj arma batalo Prezidanto Maŭ faris interesan komparon: La revolucio devas havi bazlokon, same kiel homo devas havi postaĵon. Se homo ne havus postaĵon, li ne povus sidiĝi kaj devus ĉiam stari aŭ iri kaj pro tio li certe falus post nelonga tempo. Nur se la revolucio havas bazlokon, ĝi povas disvolviĝi kaj akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Dum nia vizitado ni rimarkis ĉie tiutempajn trajtojn de la revolucia hejmo kaj komprenis el tio la malfacilan laboradon kaj la brilan penson de la revolucia gvidanto en fondado de la hejmo.

Tie troviĝas kelkaj kabanoj, kiuj servis siatempe kiel loĝejoj de la ruĝarmeanoj. En la kabanoj pordaj tabuloj, sur kiuj estas sternita pajlo, kaj maldikaj litkovriloj estis metitaj tute kiel antaŭe, kvazaŭ la batalantoj ĵus ellitiĝus kaj irus al nova batalo.

Tie estas militekzercejo. Ni kvazaŭ aŭdus kriojn de la ruĝarmeanoj en ekzercado.

En loko Ĝongging staras duetaĝa ligna domo, kiu estis rigardata siatempe kiel la plej bona konstruaĵo en la montaro. En ĝi instaliĝis hospitalo de la Ruĝa Armeo, kiu resanigis multajn vunditajn kaj malsanajn batalantojn.

En Ciping estas ligna ĉambro en kiu troviĝas amboso, marteloj kaj difektitaj pafiloj. Ĝi estis riparejo kiu siatempe riparis sennombrajn pafilojn kaj elfaris multajn glavojn kaj lancojn.

Tie estas alta kaj dika pino, sub kiu Prezidanto Maŭ ofte ripozis kaj priparolis revolucian veron al ruĝarmeanoj kiam ili descendis la montaron por transporti grenon.

Estas dezerta montvojeto. Tiutempe kiam la Ruĝa Armeo revenis post la batalo en Ĉaling, ĝuste sur la montdeklivo apud tiu vojeto Prezidanto Maŭ resumis sperton de la batalo kaj eksplikis militan principon de la popola armeo **"disigi la trupon por mobilizi amasojn kaj koncentri la trupon por batali kontraŭ la malamikoj"** kaj **"la malamiko almarŝas, ni retiriĝas; la malamiko kampadas, ni ĝenas; la malamiko laciĝas, ni atakas; la malamiko retiriĝas, ni persekutas"**.

Estas ordinara herbejo. Tie levinte sian grandan manon kaj kalkulante per la fingroj Prezidanto Maŭ deklaris la tri grandajn taskojn de la Ruĝa Armeo: batalado, pretigo de mono kaj farado de amasa laboro. Li detale lernigis al la



*Sanvan-vilaĝo*

ruĝarmeanoj propagandi al la amasoj kaj ilin organizi kaj armi por fondi ruĝan reĝimon. . .

Prezidanto Maŭ kun sandaloj sur la piedoj trairis ĉiujn montvojetojn de tiu monto kaj li ofte aperis en kabanoj de revoluciaj kamparanoj. Liaj grandaj varmaj manoj flegis la unuan popolan armeon kaj la unuan revolucian bazlokon. Dank' al lia diligenta prizorgo la revolucio enradikiĝis tie kaj de tie marŝis al la venka estonto.

## OLELAMPO

En Ginggang-montaro ni povas vidi multajn revoluciajn objektojn. Kvankam tiuj ordinaraj objektoj uzitaj siatempe de la ruĝarmeanoj estis krudaj, tamen ili radias revolucian brilon. Kiel la plej bonaj atestantoj ili interese rakontadas al ni per sensona lingvo la revolucian pasintecon kaj siatempajn vivon kaj batalojn.


Tie la plej ofte vidataj kaj kortuŝaj objektoj estas olelampoj starantaj sur tabloj kaj pendantaj sur muroj.

Plej simpla objekto estas la olelampo, konsistanta el fera malprofunda pelvo kun grandeco de manplato metita sur bambuo longa je 0.16 metro. Kun maldika meĉo trempita en aleŭrita oleo aŭ kamelia oleo en la pelvo ĝi povas bruli kaj brileti.

Pri la olelampo cirkulis multaj rakontoj.

Iujare en Pekino mi preterpasis vespere la brile iluminatan Tian-anmen-pordegon kaj min direktis al la loĝejo de iu veterana batalanto kaj nuna gvidanto de la ĉefurba garnizono. Montrante tablolampon li ekparolis pri la malfacila vivo sur Ginggang-montaro kaj pri la olelampoj.

*Longjuan-ponto*



Iun tagon nelonge post la ascendo al Ginggang-montaro Prezidanto Maŭ kunvokis respondeculojn de diversaj unuoj al kunveno, en kiu li serioze deklaris decidon pri uzo de meĉoj: Dum laborado ĉiu el la kompanioj, batalionoj kaj regimentoj povas uzi unu lampon kun tri meĉoj, kaj dum nelaborado la lampoj devas esti estingitaj; en oficejo de kompanio oni devas lumigi nur unu lampon kun unu meĉo por gvidi gardstaradon. Kompreneble brilis la lampo sur la tablo de Prezidanto Maŭ, tamen nur kun unu meĉo.


Hodiaŭ unu meĉo estas nur bagatelo. Tamen antaŭ 48 jaroj kiam ni troviĝis en malfacila periodo de la revolucio sur Ginggang-montaro, ĝi estis granda afero, pri kiu Prezidanto Maŭ devis persone fari decidon.

Ĝuste tiu olelampo akompanis Prezidanton Maŭ en sennombraj maldormaj noktoj; ĝuste ĉe tiu olelampo la popola gvidanto varmigis sian frostiĝintan penikon per spirblovo kaj skribis per ĝi famajn revoluciajn verkojn; kaj ĝuste ĉe ĝi li resumis la batalan sperton en la komenca periodo de la revolucio kaj cerbumis pri la revolucia morgaŭo.

Ĝuste kiam ni respektoplene rigardis tiun lampon, alpaŝis iu blankhara kamarado. Karesante la nigran tenilon de la lampo per sia mano kun elstaraj fingrartikoj kaj forviŝinte larmon sur la okulanguloj li mallaŭte diris: "Tiam mi ĉiuvespere aldonis al ĝi oleon!" Li tamen ne diris, kiel li kun aĝo de malpli ol 15 jaroj siatempe frostiĝis apud vojo kaj kiel li estis kondukita al Ginggang-montaro kaj restigita ĉe Prezidanto Maŭ. Li ankaŭ ne diris, ke en frosta vintro de 1928 li etendis siajn manojn al la brulanta meĉo por ilin varmigi kaj poste endormiĝis en la sino de Prezidanto Maŭ.

Mi memoras, ke iu generalo montris al mi siajn manojn kaj diris fiere: "Rigardu, miaj manoj siatempe kopiis raporton de Prezidanto Maŭ al la Centra Komitato de la Partio." Li zorgeme malfermis la unuan volumon de la "Elektitaj

*La malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ en Ciping de Ginggang-montaro*



Verkoj de Maŭ Zedong" kaj diris montrante la artikolon "La Batalo en Ginggangŝan": "Ĉu vi scias, ke tiu artikolo de Prezidanto Maŭ estis kopiita sur maldikan paperpecon, enmetita en tenilon de ombrelo kaj forportita de reprezentanto de la provinca partia komitato?"

Mi ankoraŭ memoras, ke iu maljuna marŝalo direktinta militadon en okcidenta parto de Hunan diris tre emocie: "Tiam ni neniel povis gajni la militon laŭ la malnova batalmaniero. Poste ni legis pri la sperto de Ginggang-montaro kaj ellernis gerilan militon."

Jes, en la longa nokto de la malluma Ĉinio la olelampo antaŭ Prezidanto Maŭ alte brilis sur Ginggang-montaro. Ĝi lumigis la koron de sennombraj revoluciuloj kaj la vojon por multaj batalantoj. Kvazaŭ granda torĉo ĝi ekbruligis fajregon de la revolucio kaj venigis la venkan morgaŭon de la revolucio.

## PONTO

En Ginggang-montaro profunde impresis nin la pontoj. Sur la diversformaj pontoj ĉu lignaj aŭ ŝtonaj iam lasiĝis piedsignoj de ruĝarmeanoj kaj ŝvebis fumo de batalo. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ la fruperioda Ruĝa Armeo trapasis multajn intensajn batalojn kaj venigis la venkon tra ili.

En Longŝi troviĝas granda ponto nomata "Kuniĝo". En 1928, en la neforgesebla printempo en la historio de la ĉina revolucio, la trupo partoprenínta en la fame konata Nanĉang-a Leviĝo kaj batalanta en suda Hunan venis post malfacila batalado al Ginggang-montregiono sub la gvido de Kamarado Ĝu De kaj kuniĝis sur tiu ponto kun la trupo de Ginggang-montaro.

Laŭdire, la ponto siatempe estis ligna, tamen nun ĝi fariĝis ferbetona. Starante sur la pontokapo kaj rigardante la pitoreskan pejzaĝon de la ĉirkaŭaĵo oni povas imagi al si la scenon de la tiutempaj du feraj fluoj torentantaj al la ponto kaj la bildon de kora manpremo de Prezidanto Maŭ kun lia kunbatalanto Kamarado Ĝu De.

Ek de tiu granda momento jam destiniĝis la sorto de la malamikoj esti ankoraŭ pli grave punitaj.

La antikva ŝtona Longjuan-ponto super Kihi-rivero estas historia atestanto de la granda venko de la Ruĝa Armeo super la malamikoj.



*Huangjanggie — unu el la kvin ĉefaj pasejoj de Ginggang-montaro*

En junio de 1928, nelonge post organiziĝo de la trupo de la Nanĉang-a Leviĝo kaj tiu de la Aŭtuna Leviĝo en la Kvaran Armeon de la Ruĝa Armeo, sub la gvido de la Fronta Partia Komitato estrata de Prezidanto Maŭ, la Ruĝa Armeo batalis kontraŭ la kuna eksterma kampanjo fare de la malamikoj de Hunan kaj Gianghi. Observante la principon de militado de Prezidanto Maŭ, la ruĝarmeanoj kun malbonaj armiloj frakasis kvin regimentojn de la malamikoj kaj ekstermis du regimentojn sur du montvojoj de Ginggang-montaro. Tiam la ruĝarmeanoj, ŝultroportante preditajn armilojn kaj eskortante kaptitajn malamikojn, iris tra tiu ŝtona ponto al kunvenejo por celebrado de la venko.

Nur tra ponto oni povas transpaŝi torentan fluon. Kaj la popola revolucia batalo povas atingi venkon nur tra revolucia milito. Kiom da venkaj bataloj la revoluciaj trupoj faris en la komenca periodo de la naskiĝo de la popolaj armitaj fortoj kaj en la granda batalo sur Ginggang-montaro! La unuaj venkoj estas la granda unua paŝo kaj tiuj bataloj metis fundamenton por la venko de la revolucia milito en la tuta lando.

Matene en la komenco de novembro ni kun bedaŭro forlasis la revolucian sanktejon. Trapasinte la pasejon Tongmuling la aŭto direktiĝis suden. Mi returnis mian kapon, rigardis la revoluciajn heroajn montojn kaj komprenis, ke Ginggang-montaro mem estas historia monumento kaj la fonto de venko kaj feliĉo de la ĉina popolo. Ĝi alte staros en la koro de la revolucia popolo de generacio al generacio kaj ĉiam memorigos al ĝi la gigantajn kontribuojn de la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ.

Tie ambaŭflanke de la vojo ŝvebis kortuŝa kanto el homamasoj konstruantaj ŝtupajn kampojn:

*Ĉielskrapanto alta ja estas Ginggang-montaro,*
*Senlima etendaj' estas la element' de maro.*
*Sed en kompar' kun la bonfar' de Prezidanto Maŭ*
*Tre nanas la montaro kaj profundas malpli l' maro.*

(Fino)

# La Nanĉang-a Leviĝo je la Unua de Aŭgusto

La unua de aŭgusto de la kuranta jaro estis la 50-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Post la malsukceso de la unua granda revolucio antaŭ **50** jaroj, la Komunista Partio de Ĉinio direktata de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong venkis la dekstran kapitulacan linion de Ĉen Duhiu kaj decidis fari arman reziston kontraŭ Ĉiang Kajŝek, kiu perfidis la revolucion kaj senbride buĉis komunistojn kaj revoluciajn laboristojn kaj kamparanojn. Je la unua de aŭgusto de 1927, sub la gvido de Ĝoŭ Enlaj, Ĝu De, He Long, Je Ting, Liu Boĉeng kaj aliaj kamaradoj okazis la Nanĉang-a Leviĝo, kiu markis ke la Komunista Partio de Ĉinio komencis sendepende gvidi la revolucian militon kaj krei revolucian armeon. Je la 9-a de septembro de 1927, Prezidanto Maŭ persone gvidis la Aŭtunan Leviĝon. Poste sub lia gvido la trupoj de la leviĝo marŝis al Ginggang-montaro. Tie li fondis la unuan revolucian bazlokon kaj kreis la revolucian vojon de sieĝado de urboj per kamparo por fine gajni la urbojn kaj la regpotencon de la tuta lando. La unuan de julio de 1933, la Centra Registaro de la Ĉina Laborista kaj Kamparana Demokratia Respubliko kun Kamarado Maŭ Zedong kiel la prezidanto faris decidon, ke la glora unua de aŭgusto estu la memortago de la fondiĝo de la armeo.

## I

En la kunlabora periodo de 1924 ĝis 1927, la Komunista Partio de Ĉinio kaj Kuomintango faris la Unuan Enlandan Revolucian Militon — la militon kontraŭ la nordaj naciperfidaj militaristoj. Dank' al la partopreno de la Komunista Partio en la gvido kaj ĝia influo kaj la direktado de la marksisma-leninisma linio reprezentata de Kamarado Maŭ Zedong, tiu milito senĉese akiris grandajn venkojn. Sed, en la ŝlosila tempo de senĉesa akiro de venkoj, la grandburĝaro reprezentata de Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion kaj samtempe kun tio Ĉen Duhiu en la Komunista Partio de Ĉinio reprezentanta la dekstran oportunismon rifuzis ĝustajn opiniojn de Kamarado Maŭ Zedong kaj meminiciate rezignis la gvidon super la revolucio, precipe super la armitaj fortoj, tial malsukcesis la revolucio.

Post la malsukceso de la Unua Enlanda Revolucia Milito, la popolo de la tuta lando denove falis en abismon de suferoj. Kamarado Maŭ Zedong iam montris, ke tiutempe **"interna milito anstataŭis unuiĝon, aŭtokratio anstataŭis demokration, kaj malluma Ĉinio anstataŭis luman Ĉinion."** **"La regado de la novaj militaristoj de Kuomintango estas ankoraŭ regado de la kompradora klaso en la urboj kaj la tiransinjora klaso en la kamparo, tio signifas en eksterlandaj rilatoj kapitulaci al imperiismo, enlande anstataŭigi la malnovajn militaristojn per la novaj kaj ekonomie ekspluati kaj politike subpremi la laboristan klason kaj la kamparanaron des pli senkompate ol antaŭe."** En la tuta lando la forto de la malamikoj superis la revolucian forton kaj la revolucio troviĝis en malfluso.

Sed la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo ne estis timigitaj, nek konkeritaj. La buĉado de Ĉiang Kajŝek kaj Vang Gingvej komprenigis al ili la ekstreman gravecon de arma batalo kaj ili sciis ke **"sen arma batalo, nek la proletaro, nek la popolo, nek la Komunista Partio havos ian pozicion en Ĉinio kaj ne estos triumfo de la revolucio"** kaj la marksismanleninisman veron ke **"el la pafilo venas la regpotenco".** Ili decidis ekpreni pafilojn kaj batali kontraŭ la arma kontraŭrevolucio per arma revolucio.



*La ĉefkomandejo de la Nanĉang-a Leviĝo je la Unua de Aŭgusto*

En la lasta tagdeko de julio de 1927, la ĉinaj komunistoj kun Kamarado Ĝoŭ Enlaj kiel ilia reprezentanto decidis kolekti la armeojn gvidatajn kaj influatajn de la Partio en Nanĉang de Gianghi por fari arman leviĝon. Tiu leviĝo estis gvidata de la Fronta Partia Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kun Kamarado Ĝoŭ Enlaj kiel ĝia sekretario.

En tiu tempo, la trupoj de la Norda Ekspedicio — la Nacia Revolucia Armeo, gvidataj kaj influataj de la Partio ĉefe estis: La 24-a Divizio komandata de Kamarado Je Ting de la 11-a Korpuso de la Dua Fronta Armeo; la 20-a Korpuso komandata de Kamarado He Long de la Dua Fronta Armeo; la Oficira Trejna Regimento de la 3-a Korpuso de la Kvina Fronta Armeo kaj du asekuraj taĉmentoj de la Nanĉang-a Policejo komandataj de Kamarado Ĝu De; la 25-a Divizio de la 4-a Korpuso de la Dua Fronta Armeo kun la sendependa Ferarmea Regimento kiel la ĉefa forto, kaj la Garda Regimento de la Vuĉang-a Nacia Registaro kaj la Vuhan-a Filia Lernejo de la Centra Milita kaj Politika Lernejo gvidataj de la Komunista Partio. Ili garnizonis en Giugiang kaj Nanĉang de Gianghi kaj Vuhan.

Kiam tiuj trupoj sin preparis por kolektiĝi en Nanĉang, la reakciuloj de Kuomintango Vang Gingvej kaj Sun Ke urĝe ordonis, ke He Long kaj Je Ting iru al Luŝan por kunveno, intrigante por senigi He kaj Je je komando al la trupoj. Por trovi konvenan kontraŭrimedon, Kamaradoj He Long, Je Ting kaj Je Giangjing urĝe kunvenis en boato sur Bojang-lago. En la kunveno ili analizis la situacion kaj decidis ne iri al Luŝan kaj rapide movi siajn trupojn al Nanĉang. La 27-an de julio la trupoj sub la komando de Kamaradoj He Long kaj Je Ting marŝis en la urbon Nanĉang en varma bonvenigo de la popolamasoj.

La 27-an de julio Kamarado Ĝoŭ Enlaj alvenis al Nanĉang. Tiutempe Liu Boĉeng, Peng Paj, Nie Ĵongĝen, Jun Dajjing, Vu Juĝang, Lin Bokju, Liaŭ Kianvu, Hju Teli kaj aliaj kamaradoj, pli ol 600 Guangdong-aj kamparanaj armeanoj antaŭe garnizonintaj en Vuhan kaj pli ol 70 personoj de la Vuhan-a Kamparana Politika Kurso atingis Nanĉang unu post alia. En tiu tago, la Fronta Partia Komitato de KPĈ kun Kamarado Ĝoŭ Enlaj kiel la sekretario oficiale fondiĝis en la Hotelo Gianghi (La nuna Memordomo de la Nanĉang-a Leviĝo je la Unua de Aŭgusto) kaj Ĝoŭ persone prezidis la kunvenon de la Fronta Partia Komitato. La kunvenantoj detale diskutis la problemojn koncernantajn la leviĝon. La 28-an de julio fondiĝis en la Hotelo Gianghi la Ĉefa Komandejo de la Nanĉang-a Leviĝo kun Kamarado He Long kiel la ĉefkomandanto, Kamarado Je Ting kiel la fronta ĉefkomandanto kaj Kamarado Liu Boĉeng kiel la stabestro.

En pluraj sinsekvaj tagoj la trupoj energie faris preparon por la leviĝo. Sub la gvido de Kamarado Ĝoŭ Enlaj la Fronta Partia Komitato rezolute forigis ĝenadon de la dekstra oportunisto Ĝang Guotaŭ, kiu poste perfidis la revolucion kaj fariĝis spiono de Ĉiang Kajŝek. Tio estis la ŝlosilo por glata konduko de la Nanĉang-a Leviĝo.

## II

Je la 2-a horo de la 1-a de aŭgusto de 1927, komenciĝis la granda Nanĉang-a Leviĝo gvidata

de Kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĝu De, He Long, Je Ting, Liu Boĉeng kaj aliaj. La trupoj de la leviĝo rapide sturmis la malamikojn. Ĉie en kaj ekster la urbo bruis pafado kaj kanonado. La Nanĉang-a Leviĝo forte skuis la reakcian regadon de Kuomintango. Ĝi solene deklaris al Ĉinio kaj la tuta mondo: La Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj revoluciaj popolanoj ekprenis la pafilon kaj ekbatalis por sia liberiĝo. Nokte de la 31-a, antaŭ la komenciĝo de la leviĝo, Kamarado Ĝu De, observante la decidon de la Fronta Partia Komitato, "invitis" la estrojn de la 23-a kaj 24-a Regimentoj kaj iun vicregimentestron de la Tria Korpuso de la malamikoj al la domo de urbestro. Post la 21-a horo pli ol dek batalantoj de la leviĝo embuskantaj ekster la korto sturmis la ĉambron kaj arestis la tri fiulojn. Aŭdinte la signalan pafon de la leviĝo, la leviĝaj trupoj rapide faris atakon al la malamika 23-a Regimento, premis la malamikojn en la korton, devigis ilin kapitulaci kaj ilin senarmigis. Ankaŭ la batalo por ekstermi la malamikan 24-an Regimenton estis glate farita.

Kiam la batalo iris intense, Kamarado Ĝoŭ Enlaj venis en iun lernejon por direkti la batalon, tio multe kuraĝigis la leviĝajn trupojn. Krome, ankaŭ kelkaj regimentoj de la malamikaj 9-a kaj 6-a Korpusoj estis atakataj de la leviĝaj trupoj, iuj el ili estis ekstermitaj kaj aliaj devis kapitulaci.


Je la tagiĝo de la 1-a de aŭgusto, la pafado ĉesis kaj la leviĝo sukcesis. La magazenoj kaj butikoj funkciis kiel kutime kaj la urbo estis en bona ordo. Popolamasoj en ĝojo de venko unuj post aliaj venis al la ĉefkomandejo por gratuli kaj saluti la leviĝajn trupojn. Tra la ĉielo sonis sloganoj "Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!" kaj "Vivu la leviĝaj trupoj!"

Post la sukceso de la leviĝo, la Fronta Partia Komitato kunvokis la Kunan Kunvenon de Membroj de la Centra Komitato de Kuomintango kaj Reprezentantoj de Ĝiaj Provincaj, Regionaj, Municipaj kaj Transmaraj Partiaj Organizoj, en kiu partoprenis komunistoj kaj maldekstruloj de Kuomintango. En la kunveno Kamarado Je Ting raportis pri la leviĝo, la kunvenantoj diskutis kaj pasigis la "Deklaracion de la Kuna Kunveno", la "Deklaracion de la Leviĝo je la Unua de Aŭgusto", la "Propagandan Programon de la Le-

*La laborĉambro de Kamarado Ĝoŭ Enlaj dum la leviĝo*



*La komandejo de Kamarado He Long dum la leviĝo*



viĝo je la Unua de Aŭgusto", kaj la "Deklaracion de Membroj de la Centra Komitato" subskribitan de partianoj de KPĈ, kiuj tiam estis membroj de la Centra Komitato de Kuomintango, kaj maldekstraj personoj de Kuomintango kaj aliajn dokumentojn. Poste ili elektis la Revolucian Komitaton de la Ĉina Kuomintango kun komunistoj kiel ĝia gvida kerno kaj kun partopreno de maldekstruloj de Kuomintango. La revolucia komitato konsistis el 25 personoj inkluzive de Ĝoŭ Enlaj, Ĝu De, Song Kingling, He Long, Je Ting, Lin Bokju, Vu Juĝang, Jun Dajjing, Peng Paj, Hju Teli, He Hiangning, Su Ĝaŭ-ĝeng kaj Guo Mojuo.

### III

La venko de la Nanĉang-a Leviĝo forte teruris la kuomintangan reakciularon. Ĉiang Kajŝek haste kolektis kontraŭrevoluciajn trupojn de Nankino, Vuhan, Guangdong kaj aliaj lokoj kun intenco ekstermi la leviĝajn trupojn. Fronte al la sieĝo de la kontraŭrevoluciaj fortoj, la Fronta Partia Komitato decidis, ke laŭ la antaŭa plano la leviĝaj trupoj retiriĝu el Nanĉang kaj marŝu suden al Guangdong por konstrui Guangdong-bazlokon kaj refoje fari nordan militiron.

Rezulte de tio ke la leviĝaj trupoj de Nanĉang ne iris al kamparo por tie mobilizi kaj armi la amasojn kaj konstrui tie revolucian bazlokon, sed iris suden al Guangdong, la ĉefaj fortoj de la leviĝaj trupoj malvenkis en la sieĝatako fare de la malamikoj.

*La antaŭa domo de la Oficira Trejna Regimento fondita de Kamarado Ĝu De en Nanĉang*



Por konservi la revolucian trupon kaj venigi novan altan tajdon de la revolucio, Kamarado Ĝu De, Ĉen Ji k.a. kolektis la trupojn, kiuj sukcesis trarompi la sieĝon, faris al ili ordigon kaj decidis retiriĝi el Guangdong.

En januaro de 1928 ili iris en la sudan parton de Hunan. Post interkonsiliĝo kun gvidantoj de tiea partia organizo, ili faris tie leviĝon kaj per tio batis la regadon de la Kuomintanga nova militaristo. Antaŭ tio la leviĝaj trupoj jam informiĝis ke Kamarado Maŭ Zedong iris al Ginggang-montaro kaj tie starigis revolucian bazlokon. Kamaradoj Ĝu De kaj Ĉen Ji decidis, ke la trupoj iru al la revolucia bazloko de Ginggang-montaro. En aprilo, la du revoluciaj armitaj fortoj gvidataj de Kamarado Maŭ Zedong kaj Kamaradoj Ĝu De kaj Ĉen Ji kuniĝis en Ginggang-montaro.

En resumado de la milita historio de la Komunista Partio de Ĉinio, Prezidanto Maŭ Zedong montris: **"Ricevinte doloran lecionon el la malsukceso de la revolucio, la Partio organizis tiam la Nanĉang-an Leviĝon, la Aŭtun-rikoltan Leviĝon kaj la Kantonan Leviĝon kaj tiel eniris en novan periodon de kreado de la Ruĝa Armeo. Tiu periodo estis ekstreme grava por nia Partio por ĝisfunde kompreni la gravecon de la armeo."** La granda historia signifo de la Nanĉang-a Leviĝo je la Unua de Aŭgusto estas: Alte tenante la Marksisman-Leninisman standardon de arma batalo, ĝi faris la unuan pafon al la Kuomintanga reakciularo, kio plene manifestis la revolucian spiriton de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo pri sentimeco al la fortaj malamikoj kaj daŭra batalado post malsukceso. Ĝi kritikis per praktika ago la dekstran kapitulacisman linion de Ĉen Duhiu, donis fortan rebaton al la buĉa politiko de la Kuomintangaj novaj militaristoj, peze batis la arogantecon de la Kuomintanga reakciularo, multege inspiris la batalan volon de la revolucia popolo kaj vidigis al la ĉina popolo en mallumaj tagoj la aŭroron de venko.

# Intimeco inter la armeo kaj la popolo

Eksterlerneja direktanto kaj gelernantoj






Kuna gardo al gregoj



Vizito al paciento





Helpo al maljuna pasaĝero

Konduki infanojn al laboro



Korpoekzameno al infanoj








Gastado



Gaja amuzo de armeanoj kaj popolanoj



Armeanoj kaj popolanoj kune gardas la landlimon.

# Kadroj en konstruado de DAKING-OLEKAMPO

de VANG ĈUAN

VIDANTE la arbare starantajn ŝaktoskafaldojn, stele dislokitajn oleputojn kaj seninterrompe forportatajn nafton kaj petrolkemiajn produktaĵojn en Daking-olekampo, oni nature ekpensas pri la heroaj konstruantoj — la vastaj amasoj de laboristoj kaj kadroj. La kadroj de Daking ja meritas la nomon de bonaj ekzemplodonantoj en la konstruado de Daking-olekampo.

## ORDINARAJ LABORULOJ

En ĉiu ajn vizitata loko oni apenaŭ povas distingi la gvidantojn de ordinaraj laboristoj. Foje vi opinias, ke vi interparolas kun sperta laboristo, sed fakte la lasta ja estas sekretario de la partia komitato aŭ membro de la revolucia komitato aŭ gvidanto de komandejo.

En ĉiu monato la kadroj de Daking havas tagon "lerni de laboristoj", en kiu ili devas iri al skipoj por partopreni en kunvenoj de politika studo kaj kritiko al reviziismo kaj manĝi, loĝi kaj labori kune kun laboristoj.

Lastatempe, pli ol 300 kadroj de la partia komitato kaj la revolucia komitato de Daking venis al 73 bazaj unuoj, direktate de Song Ĝenming, la sekretario de la partia komitato. Veninte al la Unua Taĉmento de la Meza Regiono de la Unua Petrolkolekta Sekcio, la sekretario, kune kun laboristoj, tage laboris kaj nokte kritikis krimojn de la "kvarpersona bando" en subfosado de la revolucio kaj produktado. Kaj je la 23-a horo li laboris kune kun laboristoj de nokta skipo kaj rondire kontrolis 5 oleputojn en tereno kovrata de glacio malgraŭ frosta vento. Jam batis la unua, kiam li revenis al la loĝejo. Sed je la sepa matene, li denove eklaboris kun laboristoj de taga skipo. Tiutage ankaŭ kadroj de diversaj komandejoj kaj taĉmentoj partoprenis en la lernado de laboristoj.

De post la fondiĝo de Daking-olekampo, partopreno de kadroj en kolektiva laboro jam fariĝis rutinaĵo. Elektite kiel membro de la Centra Komitato de la Partio, Ferulo Vang Ginhi ne apar-



*La membroj de la Partia Komitato de Daking en studo*

tigis sin de laboro kaj amasoj. Li ofte diris: "Mi ĉiam estas putoboristo." En la lastaj jaroj, la membroj de la partia komitato kaj la revolucia komitato de Daking kaj oficistoj de la institucioj, escepte de maljunuloj, malsanuloj, malfortuloj kaj kripluloj ĉiujare laboris meznombre 60 tagojn; la gvidantoj kaj oficistoj de la komandejoj 100 tagojn; la kadroj de la taĉmentoj 150 tagojn; kaj la kadroj de la bazaj unuoj ĉiam direktas produktadon partoprenante en ĝi. Ĉiuj gvidaj kadroj lertas en unu aŭ pluraj teknikoj.

La gvidantoj laboras en baza unuo kiel ordinaraj laboristoj sub la gvido de la skipestroj.

*Kadro de la 1202-a Putobora Taĉmento studas rimedojn pri rapida putoborado kune kun laboristoj kaj teknikisto.*




Foje, dum sia laborado en petrolkolekta taĉmento iu ĉefinĝeniero preterlasis unu eron en tabelo dum dejora registrado. Tion rimarkinte la putestro tuj kritikis lin severe: "Por la tuta olekampo vi estas ĉefinĝeniero kiun ni devas obei, sed ĉi tie vi estas laboristo kaj ne devas labori tiel malzorgeme." De tiam la ĉefinĝeniero observis la disciplinon de la skipo tiel konscience, ke kiam li devas ĉeesti gravan kunvenon kaj ne povas labori en la taĉmento li antaŭe petas forpermeson de la putestro.

El la diversnivelaj gvidaj kadroj 70% devenas de laboristoj. Kvankam ilia pozicio ŝanĝiĝis, tamen ĉiam ili tenas sian naturon de laborista klaso dank' al ilia ofta partopreno en kolektiva produkta laboro kaj konscia akcepto de supervido de la amasoj.

## MODELO DE AMASOJ

"La gvidaj kadroj mem nepre devas fari kion ili postulas de la amasoj fari." Tio estas postulo de kadroj de Daking-olekampo, precipe de la ĉefaj gvidantoj, al si mem. Inter laboristoj de Daking cirkulas multaj kortuŝaj rakontoj pri kadroj. Jene estas kelkaj ekzemploj.

Li Gingjong estas membro de la partia konstanta komitato de la Ĝenerala Petrolkemia Fabriko de Daking, partia sekretario de la Transporta Sekcio kaj ĝia estro. Oni diras, ke kadro, kiu disponigas kamionojn, havas efektivan povon kaj povas trovi oportunon en ĉio. Li Gingjong tamen diris: "La povo estas donita de la popolo, ni absolute ne devas preni ĝin kiel privatan privilegion." Dum la pli ol dek jaroj de gvidado de la sekcio li neniam uzis komunan kamionon por privataj aferoj. Li estas kadro, sed kiam laboro urĝe bezonas, li servas ankaŭ kiel laboristo, transportisto, ŝoforo kaj riparisto de kamiono. Foje transportado de ekipaĵoj bezonis eskorton, Li Gingjong prenis sur sin la taskon. 9 horojn li daŭre gardis sur la senkovrila kamiono, kiu galopis sur la stepo en temperaturo de pli ol 30 gradoj sub la nulo. En 1974, Li Gingjong estis elektita kiel eminenta modelo de Daking kaj glore titolita kiel "bona kadro tutkore laboranta por la bono de la kolektivo".



*Kamarado Li Gingjong laboras kune kun laboristoj en festotago.*

Ĝoŭ Ĝan-aŭ, antaŭa estro de la 11-a Konstrua Taĉmento, estas vaste laŭdata kiel "homo plej rigora en laboro". Li ofte diris: "Ĉia ajn tasko, ĉu granda aŭ malgranda, donita de la Partio kaj popolo devas esti plenumita pli bone."

Foje, dum instalado de ekipaĵoj ĉe putoaperturo, malgranda tubo, interliganta la oleputon kun la trunka tublinio, estis iom oblikve muntita, sed ankoraŭ konforma al la normo, tial iuj opiniis, ke ĝi taŭgas. Ĝoŭ Ĝan-aŭ tamen ne konsentis tian opinion kaj ĝin remuntis.

Iutage, Ĝoŭ Ĝan-aŭ venis al oleputo konstruita de ili por ekzameni la kvaliton kaj trovis kelkajn gutojn da nafto sur varmkonserva tubo de vakselimina stangeto, el kiuj unu troviĝis sur veldloko. Li trifoje venis por ĝin observadi kaj fine konstatis, ke ĝi estas kaŭzita de veldtruo. Poste oni tuj veldis ĝin. La rigoreco de Ĝoŭ Ĝan-aŭ en laboro multe influis la laboristojn de lia taĉmento. En pluraj jaroj la 11-a taĉmento gvidita de li plenumis diversajn taskojn ĉiam bonkvalite kaj altnorme kaj fariĝis unu el la avangardaj unuoj. Nun, Ĝoŭ Ĝan-aŭ jam estas promociita kiel vicsekretario de la partia komitato kaj vicestro de la revolucia komitato de Daking-olekampo.

Huang Ŝilun, vicestro de la Geologia Teknologia Instituto de la Unua Petrolkolekta Sekcio, estas ne nur laborema, sed ankaŭ firma en batalo kontraŭ la "kvarpersona bando". Agitante la amasojn kontraŭ la labora regularo de Daking per anarkismo, la "kvarpersona bando" distrumpetis, ke oni devas elkulturi "tipon de entrepreno sen labora regularo". Huang Ŝilun refutis tion dirante: "La labora regularo rezultiĝis el sango kaj ŝvito de la Daking-aj laboristoj." Li ĉiam persistas en plenumado de la labora regularo kaj en bona administrado de produktado. Por oponi kontraŭ efektivigo de modernigo de la industrio, agrikulturo, sciencoj kaj teknikoj kaj nacidefendo de nia lando, la "kvarpersona bando" diraĉis: "Prefere malrapide konstrui socialismon ol rapide kapitalismon." Huang Ŝilun juste diris: "Nun oni krias buŝe pri revolucio kaj oponas kontraŭ produktado kalumniante, ke Daking estas produkta modelo. Laŭ mi, tia homo eble estas nigrabandano! Socialismo povas esti konstruita per energia laborado, sed ne per vana kriado." Tiuj vortoj esprimis la indignon de la laborantoj de la tuta instituto.

"Vidinte kion la gvidantoj faras, ni scias kion ni devas fari." Ofte tiel diras laboristoj de Daking. Ĝuste sub la gvido de tiaj bonaj kadroj kiaj Ferulo Vang, Li Gingjong, Ĝoŭ Ĝan-aŭ kaj Huang Ŝilun, Daking nun havas industrian armeon kun alta politika konscio kaj lerteco en teknikoj, kaj ĝiaj bonaj tradicioj estas disvolvitaj.

## INTER LA KADROJ KAJ AMASOJ

La rilato inter la kadroj kaj amasoj estas intima, same kiel tiu inter fiŝo kaj akvo. En pluvaj tagoj kadroj piediris tra kota vojo por sendi kontraŭpluvajn vestojn kaj botojn al laboristoj; en neĝa nokto ili venis al la laboristaj taĉmentoj por zorge kontroli la radiatorojn, kaj en profunda nokto iris al kolektiva loĝdomo por vidi ĉu laboristoj dormas dolĉe. . .

Iun someran nokton, la politika direktanto Han Baŭtang trovis ke iu nove veninta laboristo ne havas kulvualon sur sia lito kaj tuj hejmenrevenis por depreni la sian kaj ĝin pendigis super


la lito de tiu laboristo. Dum ekspluatado de nova parto de la olekampo, al laboristoj mankis litoj portempe, la petrolkolekta taĉmentestro Ĝong Mingming cedis sian liton al laboristo, kaj li mem prenis kelkajn lignotabulojn kiel liton. Poste li donis la lignotabulojn al alia laboristo kaj li mem kuŝis sur pajloj.

Caj Ĝiĝong estas pli-ol-60-jara vickomandanto de nova petrolkolekta komandejo. En konstruado de loĝdomoj li laboris kune kun laboristoj. Post finkonstruo de la loĝdomoj, oni rezervis por li apartamenton konsiderante pri lia maljuneco, tamen li cedis ĝin al laboristo. Poste la komandejo konstruis pliajn loĝdomojn, kaj pli ol 800 familioj enloĝiĝis en la novaj domoj. Tamen tiuj domoj ne sufiĉis por plenumi la bezonojn de la laboristoj, Caj Ĝiĝong kaj liaj familianoj ankoraŭ loĝis en tendo. Li diris: "Nur se ankoraŭ estas iuj laboristoj ne enloĝiĝintaj en nova domo, mi ne forlasos la tendon."

En Daking cirkulas rakonto pri "dek akvomelonoj". Iujare, kiam maturiĝis akvomelonoj prove kulturitaj de laboristaj familianoj de la Daking-a Pionira Vilaĝo, la familianoj elektis dek grandajn akvomelonojn kaj donacis ilin al la putobora komandejo de nova parto de la olekampo por esprimi sian koron. La partia komitato kaj la revolucia komitato de la komandejo sendis naŭ el ili al la laboristoj de la putoboraj taĉmentoj kaj la lastan al la politika sekcio. Tamen la kadroj de la politika sekcio ĝin transdonacis al la produkta sekcio, sed la kadroj de la lasta diris, ke la akvomelonon ili ne devas manĝi sed devas doni al la cisternokamiona taĉmento, kies ŝoforoj pene laboras tage kaj nokte. Sekve tiu akvomelono estis transdonita plue de la produkta sekcio al la cisternokamiona taĉmento.

Limigita estas la pezo eĉ de pli granda akvomelono, sed nemezureblaj estas la amo kaj kuraĝigo de la kadroj esprimitaj per tia zorgo.

La kaŭzo ke Daking akiris tiel grandan atingon en la pasintaj 17 jaroj ja kuŝas en tio, ke Daking havas kadraron plene revolucian kaj firmajn gvidantarojn de diversaj niveloj, kiuj strikte ligiĝas kun la amasoj.



*Printempo venas al Tangŝan.*

## I

La fortega tertremo grave detruis Tangŝan. Sed Tangŝan ne malaperis. Forpasis unu jaro kaj vivoplena Tangŝan denove stariĝis sur la tero de norda Ĉinio.

En daŭro de unu jaro la laboristaro de Kajluan-karbominejo venkis diversajn neimageblajn malfacilojn. Ili riparis galeriojn longajn je 380 kilometroj kaj drenis 120,000,000 kubmetrojn da subtera akvo, kvanton egalan al la kapacito de granda akvokonservejo. La sep grandaj minejoj de la karbominejo ĉiuj rekomencis produktadon, ilia produktado jam atingis la nivelon de 1970. En la unua duono de la kuranta jaro, la karbominejo superplenumis la produktan planon difinitan de la ŝtato je pli ol 150,000 tunoj da karbo.

La afinacia fabriko kaj la laminatejo de Tangŝan jam atingis la produktan nivelon antaŭ la tertremo kaj laminatis ŝtalaĵon urĝe bezonatan de karbominejo.

Post la tertremo la ceramikaj laboristoj plenumis la eksportan taskon de altklasaj porcelanaĵoj de 1976.

HIN VEN:

# Tangŝan unu jaron past la tertremo

*En la 28-a de julio de la pasinta jaro, fortega tertremo okazis en la regiono de Tangŝan kaj Fengnan de nia lando. En la 10-a numero de EPĈ de 1976, ni raportis al niaj legantoj pri la heroaj faroj de la plagita popolo, plenumitaj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj en la helpo de la tutlandaj popolo kaj armeo.*

*Nemalmultaj legantoj skribis al ni kaj demandis, kia ŝanĝiĝo okazis al Tangŝan en la pasinta unu jaro? Tiu ĉi artikolo eble helpos niajn legantojn en ĝenerala kono pri la hodiaŭa Tangŝan.*

**— La Red.**


El la katastrofitaj entreprenoj guberniaj, subprovincaj kaj provincaj en Tangŝan-subprovinco, 97% rekomencis produktadon kaj 74% atingis la produktan nivelon antaŭ la tertremo.

La trafiko, telekomunikado, poŝto, financo kaj komercado kaj aliaj en la subprovinco estas jam restarigitaj.

La heroaj komunumanoj rapide rekomencis fundamentan konstruadon de kampoj detruitaj de la tertremo, la nombroj de la riparitaj kaj nove boritaj maŝinputoj superis la totalan nombron de maŝinputoj antaŭ la tertremo, la totala profundeco de tiuj putoj egalas al alteco de 527 Ĝolmolangma-oj kun alteco de 8,848.13 metroj. La grandaj irigaciaj konstruaĵoj estis fundamente riparitaj aŭ dragitaj. Per la tero kaj ŝtono movitaj en konstruado de diversaj irigaciaj instalaĵoj de kampoj oni povas konstrui tian digon altan kaj larĝan po unu metro, kiu povus ĉirkaŭi la terglobon je 4.5 cirkloj. La tuta subprovinco akiris bonan rikolton de tritiko en la kuranta jaro, post la bona aŭtuna rikolto en la pasinta jaro.

En la pasinta unu jaro la subprovinco konstruis simplajn loĝejojn kun pli ol 1,700,000 ĉam-

*En mateno*





*Doŭhe-elektrejo en konstruado*

broj. Krom restarigo de la originaj kuracejoj, oni nove konstruis ses provizorajn hospitalojn, ankaŭ la komerca branĉo kaj lernejoj altaj, mezaj kaj elementaj estis restarigitaj. Tio havigis al la popolo trankvilan vivon.

En la malnova Ĉinio, epidemioj ofte furiozis post granda katastrofo, sed en la nuna Tangŝan-subprovinco okazis nenia maligna epidemio; gripo kaj epidemia encefalito kaj aliaj en la unuaj ses monatoj de la kuranta jaro malpliiĝis je 70% kompare kun tiuj en la sama periodo de la pasintaj 10 jaroj.

## II

La popolo de Tangŝan neniam forgesos, ke post la tertremo la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en malsano profunde prizorgis la popolon de Tangŝan, sendis al ĝi konsolan telegramon. Li aŭskultis raportojn kaj legis informilojn pri la tertremo kaj kontraŭkatastrofaj aranĝoj, kaj antaŭ sia forpaso li ankoraŭ legis cirkuleron pri tio. Observante instrukcion de Prezidanto Maŭ Kamarado Hua Guofeng rapide sendis tien trupojn de ĈPLA, kuracistojn, riparajn taĉmentojn kaj grandan kvanton da materialoj urĝe bezonataj; li mobilizis la tutan partion, la tutan armeon kaj la tutan popolon por helpi la katastrofitan regionon. En daŭro de posttertremoj Kamarado Hua Guofeng kaj lia konsola delegacio venis al Tangŝan por bone aranĝi la vivon de la popolo. En aprilo de la kuranta jaro Prezidanto Hua refoje inspektis Tangŝan. Ĉio ĉi tio multe stimulis la katastrofitan popolon. Oni diris, ke dank' al la Partio kaj socialismo, ĉiajn ajn katastrofojn kaj malfacilojn ili povos venki.

Vang Huanming, juna trabizisto de Kajluan-karbominejo faris kalkulon: Post la tertremo li ĉesis labori 152 tagojn. Laŭ la pasinta normo ĉiu povas starigi sep fostojn en unu tago, do li trabizis je 1,064 malpli multe. Li decidis plenumi la tutan taskon inkluzive la neplenumitan parton en la restantaj 257 labortagoj de la kuranta jaro. Tio signifas, ke li devas starigi pliajn 4 trabojn krom plenumo de la norma tasko. Li sendis petskribon al la partia komitato: "La perdon kaŭzitan de la tertremo ni ŝtopos, ĉiutage ni starigos ekstrajn 4 trabojn." Je la sekvanta tago li energie laboregis kun sia junula sturma taĉmento. En aprilo de la kuranta jaro ili reviziis

*Prezentado de Pijing-teatro al infanoj*



sian planon, kaj ĝis la fino de junio tiu taĉmento starigis ekstrajn 6,277 trabojn.

En Tangŝan-subprovinco estas multaj homoj kiaj Vang Huanming kaj lia junula sturma taĉmento kiuj havas altan revolucian devoscion.

Por ripari detruitajn maŝinojn kaj ekipaĵojn, la kadroj kaj laboristoj de la Tangŝan-a Dentrada Fabriko laboregis ankaŭ en nokto kaj ne ripozis dimanĉe en sinsekvaj monatoj. Post klopodo de kvar monatoj, ili riparis kaj remuntis pli ol 400 ekipaĵojn kaj tiel rekomencis produktadon sen ŝtata investo. En la unua duono de la kuranta jaro la fabriko donis al la ŝtato profiton de 255,000 juanoj.

La Tangŝan-a Plastaĵa Fabriko estas malgranda, sed ĝiaj laboristoj havas fortan volon. Post la tertremo la ŝtato donis al ĝi 37,000 juanojn por rekomenci produktadon. Ili uzis neniun cendon el tiu sumo kaj redonis la monon al la ŝtato. Sin apogante sur la propraj fortoj kaj kun spirito de penema luktado kontraŭ malfaciloj ili rekomencis produktadon.

Laŭ nekompleta statistiko, en la pasinta unu jaro la popolo de Tangŝan kolektis el la ruino pli ol 24,000 tunojn da ŝtalaj stangetoj, pli ol 22,000 kubmetrojn da ligno kaj pli ol miliardon da brikoj, kaj riparis centojn da miloj da diversaj maŝinoj.


Leting-gubernio situas sur ebenaĵo kaj al ĝi mankis ŝtono en riparo de la kampoj. Post aŭtuno de 1976 diversnivelaj kadroj de tiu gubernio iris al Luanhian-gubernio fora je 75 km. kun transporta trupo el pli ol 16,000 homoj por transporti de tie ŝtonon. En 20 diurnoj ili transportis 12,150 kubmetrojn da ŝtono. Sub helpo de frataj regionoj kaj post klopodo en unu vintro kaj unu printempo ili boris pli ol 9,000 maŝinputojn, kiuj estas pli multaj ol tiuj antaŭ la tertremo.

## III

La tertremo kaŭzis seriozan perdon al la popolo, sed ankaŭ hardis ĝian volon.




*Antaŭ la Tangŝan-a Hinhua-librejo dum vendado de la kvina volumo de la "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong"*



*En laborejo de la Tangŝan-a Tria Ceramika Fabriko*






*La legomvendejo sur Venhua-strato de Tangŝan*

Post la tertremo la Tangŝan-a Ŝtala Fabriko rapide rekomencis produkti ŝtalon kaj poste elmetis novan celon por krei rekordon de kontinua funkciado de fornego. Ili faris racian teknikan reformon al la ekipaĵoj, klopodis por plibonigi teknologion de ĉiu procedo kaj ĉiamaniere solvis ŝlosilajn teknikajn problemojn de korodo de ŝtala likvo al la interno de la fornego por longigi la kontinuan funkciadon de fornego. Tiel ili kreis ĉinan rekordon de kontinua produkto de 1402 fornoj da ŝtalo per konvertoro kun deflanka oksigen-blovo, 99.9% de la produktaĵoj atingis la difinitajn normojn kaj la konsumitaj materialoj reduktiĝis je 3%, tio plie plibonigis la teknologion de fandado per konvertoro kun deflanka oksigen-blovo.

Post la tertremo, inĝeniero Vang Gang de la Tangŝan-a Ceramika Instituto kaj laboristoj sukcese kreis fajnan kaj brilkoloran Julan-porcelanaĵon, kiu ricevis laŭdojn en la internacia merkato.

*Karbo de Ljugiatuo-karbominejo de Kajluan estas transportata al aliaj lokoj.*




Nun, en Tangŝan 47 entreprenoj jam fariĝis avangardaj unuoj en lerno de Daking.

Ankaŭ la komunumanoj de la kamparo marŝas al nova celo. Dang-ju de Zunhua-gubernio estas tre sekeca montregiono, kie akvo fluas ĉie sur la monto dum pluvado, sed akre mankas akvo post pluvo. Sekeco multe malhelpis la disvolviĝon de ĝia agrikulturo. En la tertremo iuj malgrandaj irigaciaj konstruaĵoj estis detruitaj, la tieaj amasoj decidis denove komenci. Ili diris: "La malgrandaj estis detruitaj, sed ni faros pli grandajn!" Ili ellaboris novan konstruan projekton pri la kanalo Dongfeng, kiu, inkluzive de la branĉoj, longas 59 km. kaj trafluas kvar komunumojn. Tiu konstruado estis tre malfacila, oni devis fosi 6.5 km da monta tunelo, starigi 4 km. da akvedukto, movi 3,800,000 kubmetrojn da tero kaj ŝtonoj kaj masoni 2,550,000 kubmetrojn da ŝtonoj. En la tuta konstruejo regis vigleco kaj fervoro kaj la konstruado iris rapide.

La tute nova Tangŝan estas en projektado kaj konstruado.

*La Tangŝan-a Elektrejo*



ĴEN HONGGJUN:

# La nigra bando el kontraŭrevoluciuloj

EN longa tempo Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan energie utiligis propagandajn maŝinojn por krei publikan opinion por glorigi sin, distrumpetante, ke ili ne nur estas "merituloj" de la kultura revolucio kaj "standardistoj" de la literatura kaj arta revolucio, sed ankaŭ havas gloran "revolucian" historion kun deveno senmakula kaj pasinteco ĉiam revolucia. Tamen, nun ĉio fariĝis klara. En la lastaj monatoj, la centra organo de KPĈ faris seriozan ekzamenadon pri la politikaj historioj de la kvar personoj. Granda kvanto da nerefuteblaj faktoj montras, ke Ĝang Ĉunkiaŭ estis spiono de Kuomintango, Giang King — renegato, Jaŭ Venjuan — elemento de malamika klaso kaj Vang Hongven — nove aperinta burĝo. La "kvarpersona bando" konsistas ĝuste el tiaj nova kaj malnovaj kontraŭrevoluciuloj, estas kontraŭrevolucia sekto kaj subtera "sendependa reĝlando" kaŝita en la revolucia tendaro.

En la komencaj tridekaj jaroj, Ĝang Ĉunkiaŭ, deveninta de burokrata kaj bienula familio, servis kiel spiono por Kuomintango kaj faris krimon kontraŭkomunisman kaj kontraŭrevolucian, kiam li lernis en mezlernejo en Ginan, Ŝandong-provinco. Li denuncis al la malamiko siajn kunlernantojn gvidantojn kaj

aktivulojn de la studenta movado kontraŭ Ĉiang Kajŝek kaj la japanaj agresantoj, kaj rezulte de tio 6 revoluciaj junuloj estis persekutitaj kaj unu el ili mortis martire en malliberejo. En printempo de 1933, kiam la spiona organizo Fuhingŝe de Kuomintango fondis en Ginan eksteran organizajon ĈF-societon (Ĉina Faŝista), kaj li estis unu el ĝiaj iniciatintoj kaj spinaj elementoj. En majo de 1935, Ĝang iris al Ŝanhajo kaj sin okupis pri la sama kariero sub Cuj Vankiu, spiono de Fuhingŝe, kaj freneze atakis Lusin, aktive partoprenante en kontraŭrevolucia kultura "sieĝado" fare de Kuomintango. En aŭtuno de 1937, Ĝang Ĉunkiaŭ revenis al Ginan kaj, laŭ ordono de Kin Kijong, la estro de Ŝandong-a Filio de Fuhingŝe, tie atendis ŝancon por enŝteliĝi en la revolucian bazlokon. En januaro de 1938 li sukcesis veni al Jan-an, kaj poste aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio dank' al trompado kaŝante siajn kontraŭrevolucian historion kaj veran familian devenon.

Giang King, deveninta de bienula familio, komencis sian kontraŭrevolucian politikan vivon en la tridekaj jaroj. En februaro de 1933 ŝi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj post nelonge perdis la rilaton kun la Partio. En aŭtuno de 1933 ŝi partoprenis en la "Unio de Maldekstraj Instruistoj" kaj la Komunisma Junulara Ligo en Ŝanhajo. En oktobro de 1934, ŝi estis arestita de la Kuomintanga spiona organizo, kaj baldaŭ jam sin denuncis perfidante la Partion. Poste ankaŭ ŝi konatiĝis kun Cuj Vankiu kaj havis frekventan kaj intiman rilaton kun li. Kaj la lasta faris flataĉajn laŭdojn al ŝi en reakcia ĵurnalo. Ŝi aktive ludis rolojn en la t. n. "nacidefendaj teatraĵoj" kaj "nacidefendaj filmoj", kreitaj laŭ la kapitulaca linio, kiu propagandis por la pasiva rezisto kontraŭ Japanio kaj aktiva opono kontraŭ la komunistoj fare de Kuomintango kaj entuziasme partoprenis en la benefico por "donaci aviadilon al Ĉiang Kajŝek je la datreveno de lia naskiĝtago", flate oferante sian servemon al Ĉiang Kajŝek kaj Kuomintango. En la jaro 1937, ŝi enŝteliĝis en Jan-an, interkonsentinte kun alia renegato por reciproka ŝirmo. Dank' al la falsa atesto farita de tiu renegato, ŝi sukcesis enŝteliĝi en la Komunista Partio de Ĉinio.

Jaŭ Venjuan estas filo de Jaŭ Pengzi, kiu rampis el la malliberejo de Kuomintango, perfidinte la Komunistan Partion en la jaro 1934. Post tio Jaŭ Pengzi servis kiel kultura spiono sub la gvido de Hju Enzeng, unu el la estroj de spiona organizo — La Centra Statistika Buroo. En sia infaneco Jaŭ Venjuan akiris favoron de Hju Enzeng kaj lia edzino renegato Fej Hia, ke la lastaj prenis lin kiel sian "nominalan" filon. Li ĉiam tenis intiman rilaton kun ili ĝis ili fuĝis al Tajvan. Nelonge antaŭ la liberiĝo de Ŝanhajo, en 1948, li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, kaŝante la renegatan kaj spionan pasintecon de sia patro, sian propran devenon de bienula kaj kapitalista familio kaj siajn gravajn politikajn kaj historiajn problemojn. Post la Liberiĝo Jaŭ Pengzi persiste restis sur sia reakcia pozicio kaj estis kondamnita kiel dekstrulo en la jaro 1957 pro lia kontraŭpartia kaj kontraŭpopola starpunkto, sed Jaŭ Venjuan ĉiamaniere protektis lin. Dum la kultura revolucio en koluzio kun Vang Hongven kaj Ĝang Ĉunkiaŭ li uzis tre fiajn rimedojn utiligante sian pozicion por eviti la ekzamenadon de la Partio kaj popolamasoj faratan al lia patro. Dum longa tempo Jaŭ Venjuan ĉiam konservis striktan rilaton kun sia patro en politiko kaj ekonomio. Post la morto de sia patro en 1969 li heredis lian tutan havaĵon krom la en banko deponita mono.

Vang Hongven kvankam devenis de laborula familio, servis en ĈPLA kaj laboris en fabriko, tamen li ne studas Marksismajn-Leninismajn verkojn kaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ne remuldas sian mondkoncepton. En la kultura revolucio li grupigis ĉirkaŭ si bandon da kunulaĉoj por komenci sian egoisman karieron. Precipe post koluzio kun Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Jaŭ Venjuan, lia burĝa karierismo maligne ŝveliĝis. Li okupis sin pri reviziismo, splitigo kaj intrigoj, freneze krimis por akiri la plej altan gvidantecon de la Partio kaj ŝtato kaj fine suriris la vojon kontraŭpartian, kontraŭpopolan kaj kontraŭrevolucian. Utiligante sian uzurpitan potencon, li malversaciis, ŝtelis kaj foruzis grandajn kvantojn da ŝtataj havaĵoj, kaj lia vivo estis tute degenerinta kaj putra. Vang Hongven, kiu suĉas sangon de la laboristoj, estas tipa reprezentanto de nove aperintaj burĝoj.

La historio de leviĝo kaj pereo de la "kvarpersona bando" refoje montras al ni, ke ju pli la proletaro venkas, des pli la klasaj malamikoj klopodas por ŝteliĝi en ĝian internon, praktikante la taktikon "verme bori de la interno". Ili montras al ni falsan aspekton kaj kaŝas sian veran vizaĝon. La "kvarpersona bando" praktikis reviziismon sub la "kontraŭreviziisma" flago, faris kapitalisman restaŭran agadon sub la "kontraŭrestaŭra" ŝildo, plenumis kruelan batalon burĝan kontraŭ la proletaro sub la slogano "fari klasbatalon", kaj efektivigis diktaturon de la burĝaro sub la devizo de "diktaturo de la proletaro". Revoluciaj sloganoj servas al ili nur kiel taktiko kaj masko por kontraŭrevoluciaj agadoj. La malkovrado kaj kritikado faritaj de la popolo al krimoj de la "kvarpersona bando" dum la lastaj monatoj jam tute deŝiris iliajn maskojn de maldekstruloj, kaj malkovris iliajn verajn aĉajn vizaĝojn. Nun ekkoninte ilian pasintecon post ekspono de iliaj fundaĵoj, ni povas bone kompreni la neklarigeblan demandon, kial ili havis ĝismortan malamon kaj faris kruelan batalon kaj senkompatiajn batojn al Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj aliaj proletaraj revoluciuloj de la maljuna generacio kaj al multaj gvidantoj de la Partio, registaro kaj armeo, kiuj persistas pri la socialisma vojo, kaj kial ili senbride splitis la unuiĝon kaj instigis perfortan batalon interne de la laborista klaso kaj popolamaso. Ili ja dekomence devenas de la kontraŭrevolucia tendaro kaj havas por si la taskon renversi la socialisman reĝimon de nia lando kaj restarigi la faŝisman regadon de Kuomintango.

Kion faris en la kultura revolucio la "kvarpersona bando", kiu montris sin kiel ĝiajn "meritulojn" kaj fabrikis publikan opinion por gajni politikan kapitalon? Ili koluziis kun la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kaj ties ĉefa membro Ĉen Boda, intence inversigis la rilatojn inter ni kaj la malamiko kaj tiun interne de la popolo, malordigis la klasajn vicarojn de la proletaro, konfuzis la du specojn de la kontraŭdiro kun malsamaj naturoj, agitadis por faligi ĉiujn gvidantajn kadrojn kaj incitis plenampleksan internan batalon, por ke ili povu kapti al si la potencon en ĥaoso.

En la kultura revolucio la "kvarpersona bando" faris sektajn aktivadojn kaj formis kontraŭrevolucian bandon. Ili havis sian centron de la bando, en kiu estis mastro, stabestro, komandanto, propaganda ministro, kaj havis siajn informo-sistemon, bazlokojn kaj sekretajn interligajn punktojn. Iliaj nigraj manoj jam ŝoviĝis en iujn ministeriojn kaj provincajn kaj urbajn instituciojn. Ili starigis "la duan armitan forton" kontraŭ ĈPLA. Unuvorte, ili formis kontraŭrevolucian burĝan sektan sistemon, kiu havas sian programon, linion kaj organizon. Kvankam ili estas nur plenmano da homoj izolaj de la okcentmiliona popolo, tamen ilia energio estis tre granda. La vasteco de ilia venena influo kaj profundeco de ilia malutilo estas maloftaj en la historio de la Komunista Partio de Ĉinio.

Dum sia longa revolucia historio de batalo, la Komunista Partio de Ĉinio malkovris nombron da maskitaj kontraŭrevoluciuloj kaj senĉese purigadis sian vicaron en la batalo. Tamen troviĝas nemalmultaj kontraŭrevoluciuloj, kiuj lerte sin maskas kaj profunde sin kaŝas longe nemalkovritaj. Tiu fakto okazis en la pasinteco kaj certe okazos ankaŭ en la estonteco. Tio spegulas la longecon, zigzagecon kaj komplikecon de klasbatalo. Sed, ĉar ili volas agi kiel kontraŭrevoluciuloj, ili ne povas sin kaŝi tute komplete kaj estas neeviteble malkovritaj de la Partio kaj popolamasoj. Utiligante siajn uzurpitajn povojn, la "kvarpersona bando" koluziis en la kultura revolucio kun Lin Biaŭ kaj Ĉen Boda por ĉiamaniere kaŝi sian kriman historion. Ili sekrete translokis kaj malaperigis grandkvante atestaĵojn pri ilia kontraŭrevolucia historio. Ili sekrete organizis falsajn ruĝgvardiojn por traserĉi la hejmojn de personoj, kiuj konis ilian sekreton, kaj eĉ sekrete arestis ilin kaj longe tenis ilin en malliberejo sub ia preteksto kaj eĉ murdis iujn por mutigi ties voĉon. Sed, nun multaj atestaĵoj kaj atestantoj tamen estas trovitaj. Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio la Komunista Partio de Ĉinio frakasis la tri kontraŭpartiajn klikojn de Liu Ŝaŭki, de Lin Biaŭ kaj de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ, kaj tio pruvas, ke la klopodo de kiu ajn maskita kontraŭrevoluciulo por ruinigi nian partion estas vana.

## Novaj esperantaj eldonaĵoj de Ĉinio:

# Eternan Gloron al la Granda Gvidanto kaj Instruisto Prezidanto Maŭ Zedong

46 paĝoj 15 × 22.2 cm.

Prezo: £ 0.11 US$ 0.30 FF 1.40 DM 1.10

* * *



## Pentraĵoj de Ĉinaj Infanoj
*(albumo)*

kun 70 koloraj bildoj 18.2 × 20.8 cm.

Prezo: £ 0.28 US$ 0.70 FF 3.50 DM 1.75

## Ĉevalido Transiras Riveron
*(infana legaĵo)*

16 bildpaĝoj 16 × 18.4 cm.

Prezo: £ 0.07 US$ 0.15 FF 0.90 DM 0.70



## Interŝanĝo de Riz-semoj
*(infana legaĵo)*

24 bildpaĝoj 16 × 18.4 cm.

Prezo: £ 0.08 US$ 0.20 FF 1.10 DM 0.80

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonoĵoj), Pekino, Ĉinio

Mendu ĉe nia peranto vialoke, aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.




Tibetaj paŝtistoj konigas al sciencistoj la lokan gresejon.



Mezuro pri ŝarĝbrutoj.




Kolektado de specimenoj de fungoj.







Sciencaj laborantoj esploras pri la torenta Lancang-rivero.




Tra kruta deklivo



Esplorado pri gresejo


Kolekto de gasospecimeno de geotermika fonto





Kapto de insektoj

Sciencaj laborantoj observas radiadon de la suno.



Esploro pri geologia strukturo per sismologia metodo.





Esploro pri arbego.

# Labora Kunveno de la Ĉina Akademio de Sciencoj


DE la 20-a de junio ĝis la 7-a de julio de la kuranta jaro la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis laboran kunvenon, kiu iris en atmosfero de entuziasmo kaj solidareco por rapide kaj energie modernigi la sciencojn kaj teknikojn de nia lando.

Intima aŭdienco de Prezidanto Hua Guofeng al la sciencistoj kaj koncernaj gvidaj kadroj ĉeestantaj la kunvenon donis koran zorgon kaj kuraĝigon al la ĉi-branĉaj laborantoj de la tuta lando.

La centoj da kadroj kaj sciencistoj ĉeestantaj la kunvenon, venis de diversaj sciencesploraj unuoj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ili serioze lernis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri la scienca-teknika laboro kaj pri la politiko pri intelektuloj, kaj ankaŭ la lastatempan gravan instrukcion de Prezidanto Hua Guofeng pri la laboro de sciencoj kaj teknikoj. Prezidanto Hua Guofeng diris: "Por efektivigi modernigon de niaj industrio, agrikulturo, sciencoj kaj teknikoj kaj nacidefendo, por atingi avangardan nivelon de la mondo, ni nepre devas forte kritiki la 'kvarpersonan bandon', likvidi ĝian venenan influon kaj persisti en konduko de la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Ni nepre devas solide fari sciencajn eksperimentojn kaj kulturi pli multajn sciencajn kaj teknikajn laborantojn." Li montris ankaŭ: "Kun Maŭzedongpenso, la revolucia linio formulita de Prezidanto Maŭ, la socialisma sistemo, la nuna vicaro de sciencistoj kaj teknikistoj kaj okcent milionoj da laboremaj kaj bravaj popolanoj, ni devas havi plenan fidon pri atingo kaj supero de la avangarda nivelo de la mondo." Kun alta batalvolo tiuj reprezentantoj esprimis, ke ili regajnos la tempon perditan pro la subfoso de la "kvarpersona bando" kaj plirapidigos la sciencajn esploradojn kun revolucia spirito kaj sindonemo.

Inter la reprezentantoj troviĝis sciencistoj de la maljuna generacio kiuj travivis la malfacilajn kaj obskurajn jarojn en la malnova Ĉinio

*Fame konataj sciencistoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj kunsidas por studi la Komunikon de la Tria Sesio de la Deka Centra Komitato de la Partio.*



kaj junaj sciencaj laborantoj elkreskintaj en la nova Ĉinio. Multaj maljunaj sciencistoj bone konis la postiĝintecon de nia scienca afero kaj ĝoje vidas ĝian nunan unuapaŝan prosperecon. Ili diris, ke Prezidanto Maŭ alte taksis la sciencan eksperimenton kiel unu el la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj montris la direkton por antaŭenpuŝi nian sciencan aferon. En 1956, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong kaj sub la persona gvido de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj multaj sciencaj laborantoj partoprenis en ellaborado de la 12-jara Plano pri Disvolvo de la Scienca Afero. Dank' al apliko de gravaj rimedoj rapide disvolviĝis la sciencoj kaj teknikoj de nia lando. Nun ni jam havas niajn atombombojn, hidrogenajn bombojn kaj artefaritajn tersatelitojn.

La maljunaj sciencistoj Jan Gici, Bej Ŝiĝang, Tang Aŭking, Zeng Ĉengkuj kaj Lu Giahi, kiuj estis intime akceptitaj de Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Prezidanto Ĝu De dum ellaborado de tiu plano, dronis en feliĉa rememorado. Profesoro Tang Aŭking diris, ke Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ tre zorgis la teorian studon de la natura scienco kaj multfoje instrukciis al la Ĉina Akademio de Sciencoj plifortigi sian esploran laboron de bazaj teorioj. Rememorante pri tio li ĉiam sentas sin plena de memfido kaj energio. En la jaroj, kiam la "kvarpersona bando" freneze detruis la studon kaj instruadon de la bazaj teorioj, li ankoraŭ persistis en scienca esplorado kaj subtenis aliajn kamaradojn en tio. En studo de la teorio pri molekula orbito ili elmetis novan kalkulan metodon. Li diris, ke ĉiu sukceso akirita de ili en laboro devas esti atribuita al la Partio kaj popolo.

En la kunveno nemalmultaj sciencistoj indigne malkovris kaj kritikis, per siaj spertaĵoj, la krimojn de la "kvarpersona bando" treti la politikojn de la Partio pri sciencaj laboroj kaj persekutadi revoluciajn intelektulojn.

Por malorganizi sciencajn instituciojn la "kvarpersona bando" energie faris "kunigon de fabrikoj kaj institutoj" kaj "kunigon de lernejoj kaj institutoj", tiel ke iuj sciencaj unuoj fakte ne plu ekzistis kaj neniu zorgis pri sciencaj esploroj. Iu botanika instituto, kiu famiĝis pro siaj kulturitaj bonspecaj plantaĵoj en- kaj ekster-lande, devis ĉesigi studadon de la esploroj post la kunigo.


La frakaso de la "kvarpersona bando" estas granda liberiĝo por nia scienca afero. En tiu kunveno la novaj kaj malnovaj sciencaj laborantoj arde diskutis la disvolvan planon de sciencesplora laboro de la Ĉina Akademio de Sciencoj. La reprezentantoj firme esprimis, ke ili kontribuos sian tutan energion por efektivigi modernigon de la industrio, agrikulturo, sciencoj kaj teknikoj kaj nacidefendo de nia lando en la kuranta jarcento.





## LA DUA OCEANA ESPLORADO

Antaŭ nelonge, du oceanaj esploraj ŝipoj de nia lando faris sukcesan sciencan esploradon sur Pacifiko.

Tiuj du ŝipoj navigadis kaj laboris 72 tagojn kaj plenumis sian taskon de esplorado pri oceana hidrologio, oceana meteologio, oceana kemio, oceana gravito, oceana magnetismo, marfunda geologio kaj marfunda geomorfologio ktp.; ili unuafoje ankris sur Pacifiko kaj provis novajn oceanajn komunikilojn de nia lando kaj akiris grandan kvanton da materialo kaj donitaĵoj; ili ankaŭ korektis multajn malĝustajn signojn sur antaŭaj oceanaj mapoj kaj ŝtopis la mankon de nia lando pri esplorado de oceana magnetisma kampo, oceana navigado kaj oceana telekomuniko. En multaj flankoj ili rompis la rekordojn starigitajn en la unua oceana esplorado.





# Sekreto de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo


de **HIN HUA**

LA Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo delonge estas "mistera regiono" tre interesa al sciencaj rondoj. Ĝi sidas alte sur la terglobo kaj estas nomata la "tria poluso". Ĝia ekzisto grave influas la evoluon de la naturo kaj la aktivadon de la homaro. La sciitaj sciencaj materialoj pruvas, ke tie antaŭe estis vasta maro. Kiel fariĝis tiu konveksaĵo? Kiam formiĝis la nuna "monda tegmento"? Kiaj ŝanĝiĝoj okazis kune kun la leviĝo de la altebenaĵo? Kiaj naturaj riĉfontoj tie troviĝas? Kaj kiel oni devas ekspluati ilin? Pro la unikaj komplikaj kondiĉoj de la altebenaĵo, tiuj demandoj longe restis kiel enigmo de la scienco.

En la lastaj 4 jaroj ĉinaj sciencistoj faris malfacilan sintezan sciencan esploradon al la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, per kio ili malkaŝis unuapaŝe la sekreton de la altebenaĵo kaj liveris necesajn sciencajn bazojn por ekspluato kaj konstruado de Tibeto.

## LA "MONDA TEGMENTO" — ANTAŬE VASTA MARO

Por koni la leviĝon de la altebenaĵo kaj la geologian evoluadon, la Sinteza Scienca Esplora Taĉmento de la Ĉina Akademio de Sciencoj al la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo faris pri ĝi esploron de geofiziko, stratigrafio, paleontologio, petrologio, tektoniko, geomorfologio, kvaternara geologio, geotermo k. a. Paleontologoj kolektis pli ol 6,000 fosiliajn specimenojn de ĉ. 30 kladoj kaj klasoj kaj faris al ili klasifikadon kaj ekspertizadon. Surbaze de tio oni faris formacian mapon de Tibeto kaj fundamente klarigis la geologian evoluadon de maro en altebenaĵon kaj evoluan procezon de la paleogeografia medio en la tempo de miliardoj da jaroj de proterozoiko ĝis nuntempo. Sciencistoj trovis fosilian saŭropodon kaj aliajn du fosiliajn dinosaŭrojn okcidente de Tagmala-montaro de Ĉamdo, fosiliajn hipariojn (*Hipparion*) en la gubernioj Giĝong kaj Njanang sur la norda deklivo de Himalajo, kaj en la gubernio Ĝiju en Njanĉentangla-montaro, grandan



*Ĝolmolangma*

kvanton da maraj kaj teraj vegetalaj fosilioj de kretaceo koj terciaro. Tiuj Ekspertizitaj materialoj montris, ke en la frua kaj meza periodoj de ĵuraso kiuj distancis de la nuna tempo 140 ĝis 160 milionoj da jaroj, la nuna Ĉamdo-regiono en orienta parto de la altebenaĵo estis malprofunda maro kaj malalta kontinento kun humida kaj varma klimato; kaj en plioceno la nuna Tibeto estis konveksiĝinta kontinento, sed ne tre alta, kaj la natura aspekto similis al tiu de subtropiko, kaj nur en la lastaj milionoj da jaroj la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo grandskale leviĝis formante la nunan "Mondan Tegmenton".

## KIAL HIMALAJO LEVIĜIS?

Ĝolmolangma estas la plej alta loko sur la terglobo, kaj oni nature opinias, ke tie la terkrusto estas la plej dika. Tamen la fakto estas mala: Unuaj analizo kaj kalkulo de geofizikistoj pri gravitaj, sismologiaj kaj magnetotelurikaj donitaĵoj konstatis, ke la dikeco de terkrusto de Ĝolmolangma estas nur ĉ. 48 kilometroj, dum la terkrusto de Lasao kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ne tre alta, dikas 70 kilometrojn. Laŭ koncernaj materialoj geofizikistoj opinias ke la regiono sude de Jalucangpo-rivero kaj la subkontinento de Suda Azio apartenas al la sama terkrusta bloko, dum la regiono norde de Jalucangpo, la provincoj Guangdong kaj Hubej, la suda parto de Sovetunio kaj la suda parto de Koreio apartenas al alia sama bloko. Geologoj esploris iujn ŝtonlitojn, kiuj helpas klarigi la geologian evoluan historion de la altebenaĵo. Sur la bazo de diversaj geologiaj fakaj esploradoj, tektonikistoj faris unuapaŝan diskutadon pri la kialo de leviĝo de la altebenaĵo per teorio de plata tektoniko. Ili opinias, ke la ĉefa kialo de leviĝo de Himalajo estas tio, ke pro ekspansio de la fundo de la Hinda Oceano, la plato de sudazia subkontinento iom post iom moviĝis norden, poste koliziis kun la plato Eŭropa-Azia kaj oblikve puŝiĝis sub la randon de la Azia Kontinento. La kuniga fendo de la du platoj situas laŭ Jalucangpo-rivero.

## KIEL LA LEVIĜO DE LA ALTEBENAĴO INFLUAS LA NATURON KAJ LA AKTIVADON DE LA HOMARO?

Por studi la influojn de la leviĝo de la altebenaĵo al la naturo kaj la homa aktivado, sciencistoj faris ampleksajn esploradojn al Tibeto pri ĝiaj natura geografio, klimato, hidrologio, glaciriveroj, ŝlimo-ŝtonaj fluoj, geomorfologio, grundo, flaŭro, altklasaj vegetaloj, algoj, musko, fungoj, likeno, birdoj, bestoj, insektoj kaj fiŝoj. En la lastaj 4 jaroj sciencistoj kolektis tie pli ol 50,000 specimenojn de pli ol 20,000 specoj de altklasaj vegetaloj. En ekspertizado al parto de la specimenoj, sciencistoj trovis pli ol 100

novajn specojn, el kiuj iuj troviĝas nur sur la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo kaj iuj aliaj estas primitivaj specoj estiĝintaj kune kun la leviĝo de la altebenaĵo. Cetere oni kolektis pli ol 70,000 specimenojn de birdoj, bestoj, insektoj, fiŝoj kaj akvaj vivuloj. Tiuj sukcesoj fundamente eksplikis la konsiston kaj evoluadon de flaŭro kaj faŭno de la altebenaĵo.

En ĉifoja esplorado, niaj sciencistoj korektis per multaj senperaj ekspertizitaj materialoj, multajn erarajn asertojn pri la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo faritajn de fremdlandaj ekspedicioj. Ekzemple, antaŭe oni opiniis, ke la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo estis iam kovrita de glaciriveroj kaj multaj antikvaj vivuloj pereis, tial nun tie vivuloj estas ekstreme malmultaj. Sed nia esplorado montris, ke Tibeto havas multajn specojn de vivuloj kaj multaj specoj de vegetaloj devenis de Tibeto. Iuj aliaj fremdlandaj fakuloj asertadis, ke la vasta regiono de norda Tibeto estas senvalora "seka centro" kaj "senviva loko". Sed la esplorado pruvis, ke la flaŭro de la regiono ĉefe apartenas al la kategorio de stepo kaj dezerta stepo, kaj estas utiligebla por paŝtado.

Koncerne la influon de la leviĝo de altebenaĵo al la homa aktivado, sciencistoj pri altmonta fiziologio studis la homan adaptiĝemon al alta montaro kaj laboran fiziologion de alta montaro kaj konkludis, ke la 4,000-metra Altebenaĵo Kinghaj-Tibeta grave influas la homan aktivadon, sed homoj havas fortan adaptiĝan kapablon al medio, kaj en necesaj kondiĉoj, homoj tute povas adaptiĝi al altebenaĵo, venki ĝin kaj tie konstrui.

## UNU EL NIAJ GRAVAJ TREZOREJOJ

Esplorado konstatis, ke la sudorienta parto de Tibeto estas tre riĉa je arboj. La specoj de arboj estas tre multaj, la arboj kreskas rapide, dense, kaj multaj estas valoraj ekonomiaj kaj materialaj arboj. Tie estas alia grava regiono de primitivaj arbaroj, kiu viciĝas nur post la arbaraj regionoj de la Granda kaj Malgranda Hing-an-montaroj, Junnan- kaj Siĉuan-provincoj.

Tibeto havas multajn riverojn kaj lagojn, kiuj pretigis bonajn kondiĉojn por disvolvo de industrio, agrikulturo kaj brutobredado. Inter la grandaj riveroj de nia lando Jalucangpo-rivero havas plej grandan akvopovon. Post esplorado sciencistoj elmetis ideon pri ekspluato de akvopovo de la rivero kaj lagoj.


Geotermika esplorado montris, ke la vasta areo sude de Ganggardesi-montaro kaj norde de Hi-



*Aza-glacirivero de mara tipo*


*Maljuna botanikisto Vu Ĝengji (la dua de dekstre) kaj aliaj botanikaj esplorantoj faras esploradon pri altmontaj plantoj.*





*Abio pli ol 40 metrojn alta*

*La fosilio de supra dentaro de hipario elfosita en Ĝiĝong-gubernio de Tibeto*



malajo estas hidrotermika zono en intensa aktivado. Preskaŭ en ĉiuj gubernioj de Tibeto vidiĝas geotermikaj spuroj. La aktiva zono de Ŝikjuan-Jalucangpo en suda Tibeto estas unu el la plej fortaj hidrotermikaj zonoj, kaj la multeco de specoj de ĝiaj hidrotermikaj spuroj kaj la forteco de tiea geotermika aktivado estas maloftaj en la mondo. Iuj hidrotermikaj areoj jam fariĝis ekspluateblaj varmkampoj. Laŭ analizo de materialoj, la varmo fontas el aktivado de magmo proksima al la terkrusto.

## LATENTA FORTO POR PLI BONA PRODUKTADO DE AGRIKULTURO

Ekirante de la aktuala stato de la agrikulturo kaj paŝtado de Tibeto, sciencistoj pri agronomio kaj brutobredado faris studon pri kulturado de plantaĵoj, fitofiziologio, vegetala protekto, riĉfonto de plantospecioj, agronomiaj meteoj, grundo, sterko, riĉfonto de gresejoj, ekologio-fiziologio de brutoj k.a. Ili opinias, ke granda estas la latenta forto de Tibeto por pli alta produktado de agrikulturo. Tie estas multa akvo, vasta tero, malvarmeta altebenaja klimato, sufiĉa sunbrilo, forta radiado, granda temperatura diferenco inter tago kaj nokto. . . Ĉiuj ĉi tiuj kondiĉoj estas tre favoraj por kreskado de tritiko kaj similaj grenspecioj. Estas antaŭvideble, ke en Tibeto senĉese aperos bonegaj grenspecioj kaj Tibeto fariĝos loko kun alta produktado de tritiko kaj similaj plantoj de nia lando. Resumante la sperton de la amasoj en kulturado de tritiko, sciencistoj faris proponojn pri konvena denseco de plantaĵoj, prevento de morto de plantidoj, fekundigo de grundo, racia irigacio kaj vastigo de kultur-areo de hordeo. Cetere la sciencistoj trovis sur la vasta areo de Tibeto multajn speciojn de sovaĝa hordeo kaj duonsovaĝa tritiko, kio liveris novan gravan materialon al esplorado de la deveno de hordeo kaj tritiko. La paŝtado de Tibeto havas vastan perspektivon. Tie gresejoj estas vastaj, herboj sukoplenaj, brutoj bonrasaj. Tibeta ŝafo havas bonkvalitan, longan kaj elastan lanon. Se oni aplikos konvenan metodon en bredado, la bredado de la tibetaj ŝafoj havos bonan perspektivon kaj Tibeto fariĝos grava loko por disvolvo de bredado de lana-vianda duonfajnlana ŝafo.

## PLI OL 400 SCIENCISTOJ PARTOPRENIS EN LA SINTEZA ESPLORADO

La sinteza scienca esplorado al la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo estas unu el la gravaj temoj de scienca studo de nia lando, kiu estis atente zorgata de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ. En 1951, kune kun la trupoj de ĈPLA, scienca laborgrupo iris en Tibeton kaj tie faris esploradon. De 1960 ĝis 1966, la Ĉina Akademio de Sciencoj plurfoje sendis tien sciencistojn por esplori regionojn de Ĝolmolangma kaj Ŝiŝjapangma en la meza parto de Tibeto. Ĉifoja esplorado bazita sur la antaŭaj klopodoj, estis komencita en 1973. En la esplorado partoprenis pli ol 400 sciencistoj de pli ol 50 fakoj venintaj de 14 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ili restigis siajn spurojn ĉie tra la tuta Tibeto kaj sume iris pli ol 600,000 kilometrojn. La esplorado plene montris la avantaĝon de nia socialisma sistemo.

En la 4-jara esplorado al la altebenaĵo la sciencistoj timis nek malfacilojn nek morton, ili laboradis en neĝo kaj glacio, ofte tranoktis subĉiele, sed ili pene laboris en harmonia kunlaboro. Ili strebis nek al fameco, nek al profito montrante tute novan spiritan fizionomion de sciencistoj harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

Nun ili zorgeme faras resumon kaj studon pri la esplorado kaj decidis fari novan aktivan kontribuon al la scienca afero de nia lando kaj al la socialisma konstruado de Tibeto.

*Prilaborado de nigrakolaj anseroj de Tibeto en specimenojn*



*Membroj de la esplora taĉmento mezuras la profundecon kaj temperaturon de la akvo en Bangong-lago.*



*La Ĉabu-a Gejsero ŝprucas 208 fojojn en unu diurno. La plej granda alteco atingita de la akvokolono estas sep metroj.*






# La hanioj

de ZONG MIN



LA hania nacieco kun pli ol 550,000 membroj estas unu el la naciecoj loĝantaj en la montaroj de la sudokcidenta landlima regiono de Ĉinio. Ili vivas en Honghe, Mogiang kaj aliaj pli ol dek gubernioj de suda Junnan.

La hanioj estas nacieco kun longa historio. Frue en la dua jarcento a. K. iliaj prapatroj loĝis en la baseno de Luŝuj sude de Dianĉi, kaj poste ili translokiĝis al la suda kaj norda bordoj de Honghe-rivero. Post la oka jarcento p. K. la prapatroj de la hanioj eniris klasan socion. En la dinastioj Tang kaj Song (618 — 1279 p. K.) la hanioj estis regataj rekte de loka registaro de Junnan sub tiuj dinastioj, kaj en la dinastioj Juan, Ming kaj King (1280 — 1911) la ĉefo de la hanioj ricevis oficistan titolon de la centra kortego.

En la longa historia disvolviĝado, la hanioj formis siajn kulturajn kutimojn kun naciaj karakterizajoj. La viroj kutimas porti nigran turbanon, la virinoj flordesegnan tolon. La virinoj portas borderitan jakon oblikve malfermatan en la dekstra flanko kaj grandan arĝentan ringon sur la brusto. La hanioj praktikas monogamion kaj povas libere amindumi antaŭ geedziĝo. Krom festoj de kultado, la hanioj havas ankaŭ festojn koncerne al produktado, kiel ekzemple la Festo de Gustumo de Nova Greno post rikolto, okaze de kiu la kamparanoj preparas manĝon el nova rizo por unue oferi ĝin al bovo por danki ĝian laboron, kaj nur post tio ili povas manĝi novan rizon. En festotagoj, la haniaj virinoj junaj kaj maljunaj surmetas al si elegantajn vestojn, la gejunuloj ludas per balanciloj kaj viroj faras konkurson de luktado. La hanioj estas lertaj en kantado kaj dancado. Krom trikorda kaj kvarkorda plukinstrumentoj, la haniaj gejunuloj ŝatas ludi bambuan blovinstrumenton similan al fluto kun truoj, kies sonoj estas malaltaj kaj molaj.

La regiono loĝata de la hanioj estas subtropika, kie longe brilas la suno, mallonga estas la prujna periodo, abunda estas la pluvkvanto, fekunda estas la grundo kaj multe produktiĝas rizo, maizo, legumenacoj, sukerkano, arakido, tabako, teo, kotono, banano, ananaso kaj mango. En la praarbaroj de Ajlaŭ-montaro kaj en Hiŝuangbanna-subprovinco troviĝas abundo da ekonomiaj arboj kaj raraj birdoj kaj bestoj. La laboremaj haniaj popolanoj havas riĉan sperton en agrikultura produktado. En distriktoj loĝataj de hanioj ofte vidiĝas impona pejzaĝo de vasta etendajo de ŝtupaj kampoj kuŝantaj unuj super aliaj de rivervalo ĝis montsupro.

Kvankam la haniaj hejmlokoj havas bonajn naturajn kondiĉojn kaj abundajn riĉfontojn, tamen en la malluma malnova Ĉinio la vasta hania kamparanaro vivis tre mizere, ĉar tiam la agroj estis tenataj de la haniaj ĉefoj kaj bienuloj kaj la kamparanoj devis pagi altan rentumon, multajn specojn de impostoj kaj fari senpagajn servojn al ili. Kaj krome pro ekstrema postiĝinteco de la kultura, eduka kaj sanprotekta aferoj, epidemioj furiozis en tiu regiono kaj la nombro de la hanioj malkreskis jaron post jaro.

En la lastaj pli ol cent jaroj, la hania popolo faris plurajn armitajn batalojn kontraŭ imperiisma agreso kaj la ekspluatado kaj subpremado de la hania reganta klaso. En 1860, la franca imperiismo senĉese invadis sudan Junnan de nia lando. Haniaj, hanaj kaj ji-aj popolanoj plurfoje frakasis la armitan invadon de la malamikoj per primitivaj bataliloj kaj faris valoran kontribuon en defendo de nia sankta landlima teritorio.

Samtempe kun la batalo kontraŭ agresantaj imperiistoj, la hania popolo ankaŭ luktis kontraŭ la reakciaj regantoj. En 1853, haniaj kaj ji-aj popolanoj kolektiĝis por insurekcio kaj furioze atakis regantojn de King-dinastio kaj la feŭdan bienularon. Ili fondis revolucian regpotencon en Ajlaŭ-montaro kaj ĝin

tenadis 20 jarojn. En 1917, sub la gvido de hania malriĉa kamparanino Lu Mejbej, pli ol dek mil haniaj kaj mjaŭ-aj popolanoj faris armitan insurekcion. Ŝiaj armeanoj malfermis grentenejojn de lokaj regantoj kaj bienuloj kaj distribuis la grenon al malriĉaj kamparanoj. Tiu potenca kamparana insurekcio kvazaŭ fulmotondro frapis la nestojn de la lokaj regantoj. Ĝi ekstermis aŭ forpelis la lokajn regantojn grandajn kaj malgrandajn, kiuj kutimis tirani super la popolo. Hodiaŭ ankoraŭ cirkulas anekdotoj pri la gvidantino Lu Mejbej inter la haniaj popolanoj.

En la Liberiga Milito, brulis incendie la revoluciaj bataloj de diversaj lokoj de Junnan sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Nemalmultaj haniaj gejunuloj aliĝis al gerilaj taĉmentoj gvidataj de la Kompartio. En la batalo ĉe Ĝugie de Juangiang-gubernio en 1948 ili ekstermis pli ol 130 Ĉiangkajŝek-ajn armeanojn kaj kaptis multajn armilojn. La gerila taĉmento marŝis en venko kaj detruis la nestojn de la banditaj trupoj ĉe Juangiang, Mogiang kaj aliaj lokoj. Samtempe kun tio, ankaŭ la armitaj fortoj de diversnaciecaj popolanoj de Hiŝuangbanna k. a. faris atakojn kaj vundis kaj mortigis grandan nombron da malamikoj. Per siaj brilaj venkoj, la revoluciaj armitaj fortoj de la hania popolo helpis la suden-marŝantan ĈPLA-trupojn kaj bonvenigis la aŭroron.

En vintro de 1949, liberiĝis la tuta regiono de la hanioj kaj ĉi tiuj hurais pro sia nova vivo same kiel la aliaj naciecoj de la tuta lando.

Post la Liberiĝo, samtempe kun la likvidado de la restantaj fortoj de la Kuomintang-a reakciularo kaj stabiligo de la socia ordo, la popola registaro helpis la haniajn malriĉajn popolanojn al kiuj mankis vestoj, manĝajoj kaj aliaj materialoj por vivteno kaj produktado. Haniaj kadroj rapide kreskis en batalado. En la 18-a de majo, 1954 kaj la 18-a de novembro, 1957 fondiĝis unu post la alia en lokoj koncentre loĝataj de hanioj la Giangĉeng-a Aŭtonoma Gubernio de Hanioj kaj Jioj kaj la Honghe-a Aŭtonoma Subprovinco de Hanioj kaj Jioj.

Antaŭ la Liberiĝo, kvankam la hanioj jam eniris feŭdan socion, tamen pro neekvilibra disvolviĝo de la socia ekonomio, iuj lokoj ankoraŭ restis en la stadio de sinjormastra ekonomio. Post la Liberiĝo, post fondo de agrikulturaj kooperativoj kaj popolaj komunumoj, la hanioj saltis en socialisman socion, kaj ankaŭ ilia agrikultura produktado rapide disvolviĝis. Precipe dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio, la haniaj kamparanoj energie kondukis amasan movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj faris agraran fundamentan konstruadon. Ni prenu Honghe-gubernion kiel ekzemplon. De 1972 ĝis 1973, tiu gubernio konstruis kaj riparis 86 mezgrandajn kaj malgrandajn akvokonservejojn, 165 irigaciajn kanalojn, kreis kaj reformis 17,750 muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da kampoj. La totala produktokvanto de greno en 1973 pliiĝis je 21% kompare kun tiu en 1972.

Antaŭ la Liberiĝo, en la hania regiono preskaŭ ne ekzistis industrio, sed nun tie jam funkcias elektrejoj, ferajfabrikoj, prilaborejoj de greno kaj teo kaj fabrikoj de kemisterkoj. Depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, sole en la Honghe-a Aŭtonoma Subprovinco de Hanioj kaj Jioj oni fondis kaj plivastigis 10 kemisterkajn fabrikojn. La totala produktokvanto de kemisterko de la tuta subprovinco en 1973 kreskis je pli ol 20-oblo kompare kun tiu en 1965 antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, tiel ke la subprovinco jam povas kontentigi sin per sufiĉa kvanto da kemisterko. Nun ĉiuj gubernioj de la aŭtonoma subprovinco jam havas aŭtomobilan trafikadon kaj komercan servon. Antaŭ la Liberiĝo, oni devis doni 5 kg. da kotono por ricevi 1 kg. da salo, dum nun oni povas ricevi 11 kg. da salo kontraŭ 1 kg. da kotono. La vivnivelo de la hanioj altiĝas tagon post tago.

La kultura kaj sanprotekta aferoj en la hania regiono ricevis rapidan disvolviĝon. Nun eduko de elementaj kaj mezaj lernejoj jam estas ĝeneraligita kaj lernoaĝaj geknaboj povas lerni en proksimaj elementaj lernejoj. En la gubernioj kaj distriktoj de la hania regiono jam fondiĝis hospitalo kaj kuracejo kaj kuracistoj ofte faras rondiran kuracadon en haniaj montvilaĝoj. Ankaŭ la produktaj brigadoj de la hanioj kulturis siajn nudpiedajn kuracistojn.

Antaŭ la Liberiĝo, la hanioj havis multajn superstiĉajn tabuojn. La reakciaj regantoj faris religiajn kaj superstiĉajn trompojn por sklavigi kaj ekspluati la popolamasojn. Ekzemple, se hania virino naskis ĝemelojn, la ĉefo de ŝia vilaĝo ne nur mortigis la bebojn, sed ankaŭ forpelis iliajn gepatrojn el la vilaĝo kaj okupis ilian tutan havaĵon, kaj krome faris superstiĉajn aktivadojn kun ofero de dombruto por "forpeli diablon". Post la Liberiĝo, sekve de abolo de la ekspluata sistemo kaj altiĝo de la politika konscio de la popolo, tiaj superstiĉoj estas tute likviditaj kaj la nova generacio sane kreskadas sub la protekto de la leĝoj de la ŝtato.

En la 27 jaroj post la Liberiĝo, la hanioj atingis grandajn sukcesojn tiel en la socialisma revolucio kiel en la socialisma konstruado.

El ĉina moderna historio

# Agresoj de la cara Rusio kontraŭ Ĉinio

POST la malvenko de la Opia Milito en 1840, Ĉinio turniĝis en duonkolonion konkure prirabatan de la potencoj. La putra kaj malforta registaro de King-dinastio povis nek regi la popolon nek rezisti kontraŭ agresado fare de fremdaj landoj. Dum dekkelk jaroj ekde 1851, la insurekcioj de diversnaciaj popolanoj kun la Tajping-a Ĉiela Regno kiel centro leviĝis kiel incendioj en pli ol 10 provincoj de Ĉinio. En 1856, eksplodis la Dua Opia milito. La aliancaj britaj-francaj trupoj dufoje entrudiĝis en Ĉinion, ili ne nur plurjare okupadis la gravan urbon de suda Ĉinio — Kantonon, sed ankaŭ freneze invadis Pekinon kaj devigis la registaron de King-dinastio subskribi la neegalrajtajn ĉinan-britan "Traktaton de Tiangin" kaj ĉinan-francan "Traktaton de Pekino". Dum tiu milito, la cara Rusio, kiu ĉiam faris koloniisman ekspansion, kaptis la ŝancon de kadukiĝo de la King-dinastia registaro por rapidigi siajn okupadon kaj mordetadon al la vasta teritorio nordorienta kaj okcidenta de nia lando.

La basenoj de Hejlong-rivero kaj Ussuri-rivero de nordorienta Ĉinio de ĉiam estas ĉina teritorio. Frue en la 11-a jarcento a. K., tiu loko jam havis intiman politikan rilaton kun Okcidenta Ĝoŭ-dinastio. En la komenco de la 8-a jarcento Tang-dinastio starigis tie administracian institucion. En la kvardekaj jaroj de la 17-a jarcento, la cara koloniisma Rusio, kiu ekspansiigis sian forton orienten paŝon post paŝo, invadis la basenon de Hejlong-rivero sude de la Ekstera Hing-an-montaro kaj perforte okupis Nipĉu, Jakesan kaj aliajn lokojn. La registaro de King-dinastio multfoje elmetis protestojn al la cara registaro kaj estis devigata rebati por sindefendo. Subtenate de la popolamasoj, Ĉinio venkis la carajn agresajn trupojn okupantajn Jakesan kaj devigis la lastajn ĉesigi la agresan militon. En septembro de 1689, post intertraktado Ĉinio kaj Rusio subskribis la unuan landliman traktaton — "Ĉinan-Rusan Traktaton de Nipĉu", kiu klare difinis, ke Erhkuna-rivero, Gorbica-rivero, la Ekstera Hing-an-montaro kaj la marbordo formas la orientan landlimon inter Ĉinio kaj Rusio, kaj leĝe certigis, ke la basenoj de Hejlong-rivero kaj Ussuri-rivero sude de la Ekstera Hing-an-montaro inkluzive Kuje-insulon (Saĥalin) ĉiuj estas ĉina teritorio.

Post la subskribo de la "Ĉina-Rusa Traktato de Nipĉu", la caroj neniam rezignis sian ambicion agresi Ĉinion. Nelonge post la Unua Opia Milito, la caro Nikolaj la Unua decidis efektivigi la ĵuron de la caroj Petro la Unua kaj Jekaterina la Dua depreni la enfluejon de Hejlong-rivero per armitaj fortoj. En 1847, li sendis ekspansiiston Muravjev al la Orienta Siberio kiel ĝian prefekton, tie starigis Transbajkalan Kozakan Armeon el ĉirkaŭ 50,000 homoj inkluzive husarojn kiel ĉefan forton por agresi Hejlong-regionon. Samtempe li elsendis la caran mararmeon kun oficiro G. I. Nevelskoj kiel ĝia ĉefo trifoje kontraŭleĝe invadi la enfluejon de Hejlong-rivero kaj Kuje-insulon (Saĥalin) en 1849, 1850 kaj 1851, perforte okupis Miaŭgie, la gravan lokon ĉe la enfluejo de Hejlong-rivero, tie starigis gvatejojn kaj alinomis ĝin Nikolaevsk. Nikolaj la Unua laŭdis la kriman agreson de sia armeo, kriante: "Kie la rusa flago estas levita, ĝi neniel devas esti malhisita."

En 1853, la caro Nikolaj la Unua ordonis, ke Muravjev okupu la ĉinan teritorion per pli granda armita forto. Li diris, ke Ĉinio devas kontentigi la tutan postulon de lia lando, se ĝi ne konsentos, ili do devigos ĝin konsenti tion per armita forto tenata en iliaj manoj. Malgraŭ multfojaj protestoj de la registaro de King-dinastio, la cara Rusio ekspedis multajn ŝipojn kun granda nombro da agresantoj en la jaroj de 1854 ĝis 1857, kiuj kvarfoje entrudiĝis en Hejlonggiang kaj perforte okupis Hajlanpaŭ (Blagoveŝĉensk) kaj aliajn lokojn. Ili senskrupule starigis grandan nombron da gvatejoj, kozakaj vilaĝoj, ka-

zernoj kaj fortikajoj sur la ĉina teritorio — la norda bordo de la supra kaj meza partoj de Hejlong-rivero kaj ambaŭ bordoj de ĝia malsupra parto por efektivigi militan okupon. Krome ili kontraŭleĝe establis la apudmaran gubernion de la Orienta Siberio kun Miaŭgie kiel ĝia ĉefurbo kaj arbitre metis la malsupran basenon de Hejlong-rivero de ĉina teritorio sub ĝian administradon.

En oktobro de 1856 eksplodis la Dua Opia Milito. Utiligante la ŝancon, la registaro de la cara Rusio faris atakon kontraŭ Ĉinio. En la komenco de 1857, la caro Aleksandro la Dua sendis E. V. Putjatin kiel ambasadoron al Ĉinio kaj la lasta elmetis malpravan postulon al Ĉinio, ke Hejlong-rivero kaj Ussuri-rivero estu difinitaj kiel landlimo, sed la registaro de King-dinastio rifuzis la postulon. Tuj poste E. V. Putjatin komplotis kun la ambasadoroj de Britio kaj Francio kaj subagitis la aliancajn britajn-francajn trupojn ekspedicii norden por plivastigi agresadon. En la 20-a de majo de 1858, la aliancaj trupoj okupis Dagu kaj per tio minacis Pekinon. En la 22-a de la sama monato, sub protektado de du kanonboatoj, Muravjev persone kondukis pli ol 200 rusajn soldatojn rekte al Ajgun kaj devigis generalon Hejlonggiang de King-dinastio subskribi la traktaton projektitan sole de la cara Rusio. Sub minacado de ĝiaj kanonoj, la King-dinastia mandareno devigite subskribis la "Ĉinan-Rusan Traktaton de Ajgun" je la 28-a de majo. Depost tiam, pli ol 600,000 kvadrataj kilometroj da ĉina teritorio norde de Hejlong-rivero kaj sude de la Ekstera Hingan-montaro estis aneksitaj de la cara Rusio, kaj la ĉina teritorio oriente de Ussuri-rivero ĝis la marborda regiono estis kune administrata de Ĉinio kaj Rusio

Kiam la "Traktato de Ajgun" apenaŭ estis subskribita, la cara Rusio tuj faris militan minacon, diplomatan ĉantaĝon kaj alian senhontan artifikon kontraŭ Ĉinio por devigi la registaron de King-dinastio subskribi "Ĉinan-Rusan Traktaton de Tiangin". Per tio ĝi plivastigis la antaŭe akiritan komercan privilegion en Ĉinio kaj havigis al si ĉiujn interesojn samajn al tiuj pri kiuj pretendis Britio kaj Francio per arma agreso. Samtempe sub la komando de la agresa pioniro Muravjev granda eskadro entrudiĝis en Ussuri-riveron kaj ĝian orientan areon. La agresantoj mezuris teron kaj desegnis mapon, perforte okupis havenojn, konstruis ŝoseojn, fuortojn kaj arojn da militaj apogpunktoj por fari faktan okupon al la areo oriente de Ussuri-rivero. Je la 14-a de novembro, 1860, profitante la militan okupon fare de la britaj kaj francaj agresaj trupoj al Pekino, pretekstante la meriton de "ĉesigo de milito" kaj minacante per apliko de milita rimedo, la rusa imperiismo trompe devigis la registaron de King-dinastio subskribi la "Ĉinan-Rusan Traktaton de Pekino", per kiu ĝi aneksis ĉirkaŭ 400,000 kvadratajn kilometrojn de la t.n. kune administrata ĉina teritorio oriente de Ussuri-rivero inkluzive Kuje-insulon (Saĥalin).

La "Ĉina-Rusa Traktato de Ajgun" kaj la "Ĉina-Rusa Traktato de Pekino" tute neis la ĉinan-rusan landlimon de la orienta parto difinitan en la "Ĉina-Rusa Traktato de Nipĉu". Tio serioze difektis teritorian integrecon de Ĉinio. La rusaj feŭdaj absolutistoj perforte trudis la neegalrajtajn traktatojn al la ĉina popolo, kiam la lasta troviĝis en la senpova stato. Riproĉante la caran Rusion en komentariado de la "Ĉina-Rusa Traktato de Ajgun" en 1858, Marks diris: **"La Dua Opia Milito helpis Rusion akiri la plej riĉan regionon inter Tatar-markolo kaj Bajkalo, kiun Rusio antaŭlonge avidis."** Ankaŭ Engels montris, ke profitante la agresan militon fare de Britio kaj Francio kontraŭ Ĉinio, Rusio rabis **"de Ĉinio teritorion kun vasteco de Francio plus Germanio kaj la riveron kun longeco de Danubo".**

Okupinte grandan areon de nord-orienta Ĉinio, la cara Rusio ankoraŭ ne kontentiĝis kaj faris frenezan agresadon al okcidenta regiono de nia lando.

Frue antaŭ la Kristnasko, Han-dinastio de Ĉinio jam establis administrajn organizojn en la regionoj oriente kaj sude de Balkaŝo en okcidenta Ĉinio. En la 7-a kaj 8-a jarcentoj p. K., Tang-dinastio starigis tie unu post alia Anhiduhufu-administrejon kaj Bejtingduhufu-administrejon. La fama poeto de Tang-dinastio de Ĉinio Li Baj naskiĝis en grava urbeto Sujje (proksime de Tokmak, okcidente de Alma-Ata, la ĉefurbo de la Kazaĥa Soveta Socialisma Respubliko) sude de Balkaŝo. En King-dinastio, la regionoj de la supra baseno de Irtiŝ-rivero kaj de Balkaŝo ĝis Pamiro ĉiuj apartenis al Hingiang regata de generalo Jili.

Ekde la caro Petro la Unua, la cara Rusio ĉiam havis agresan ambicion okupi la vastan riĉan areon de Ĉinio. De la tridekaj jaroj de la 19-a jarcento la cara Rusio komencis mordeti la ĉinan teritorion per metodo de starigo de agresaj apogpunktoj. En la "Ĉina-Rusa Traktato de Pekino" subskribita en 1860, la cara Rusio arbitre difinis la linion de la okcidenta parto de la ĉina-rusa landlimo, per kio ĝi propriĝis al si Balkaŝon situantan en la ĉina landlimo kaj la vastan areon oriente kaj sude de la lago. En aŭgusto de 1862, Ĉinio kaj Rusio komencis intertraktadon pri

difino de landlimo. La cara Rusio faris armajn minacojn kaj devigis la registaron de King-dinastio subskribi alian neegalrajtan traktaton la "Prospektora Protokolo pri Fiksado de Ĉina-Rusa Landlimo". Per tiu protokolo la cara Rusio faris la landliman lagon Issik Kul difinitan en la "Ĉina-Rusa Traktato de Pekino" kiel sian teritorian lagon. Per la supre menciitaj traktato kaj protokolo, la cara Rusio aneksis 440,000 kvadratajn kilometrojn da teritorio de okcidenta Ĉinio. En 1871, la caraj trupoj entrudiĝis en Jili-regionon de Ĉinio, kaj tie restadis dek jarojn. En februaro de 1881, la cara registaro devigis la registaron de King-dinastio subskribi la "Ĉinan-Rusan Traktaton de Jili", per kiu kaj postaj kelkaj protokoloj ĝi plue okupis 70,000 kvadratajn kilometrojn da ĉina teritorio. Krome la cara Rusio en multaj lokoj transpasis la landlimon difinitan en la neegalrajtaj traktatoj kaj daŭre rongadis ĉinan teritorion, ekzemple ĝi okupis pli ol 20,000 kvadratajn kilometrojn da ĉina teritorio en la regiono Pamiro malobservante la difinon de la "Daŭra Prospektora Protokolo pri Fiksado de la Ĉina-Rusa Landlimo de Kaŝgaro" subskribita en 1884.

Aplikante diversajn sovaĝajn kaj ruzajn manovrojn, la cara Rusio perforte okupis pli ol 1,500,000 kvadratajn kilometrojn da tero nord-oriente kaj okcidente de Ĉinio, kiuj egalas tri Franciojn. Ĝi estis lando, kiu plej multe forrabis la ĉinan teritorion post la Opia Milito.

La ĉinaj diversnaciaj popolanoj havis grandajn indignon kaj malamon al la caraj agresantoj. Ekde la unua tago, kiam la caraj rabistoj ekpaŝis sur la sanktan teritorion de Ĉinio, la ĉinoj jam ekprenis armilojn, faris bravan rezistadon kaj peze batis ilin. En la jaroj 1867 kaj 1868, kelkmil loĝantoj de la insulo Kingdaŭ (la nuna Askold de Sovetunio) sudoriente de Ussuri-rivero, Suĉeng (la nuna Suĉan de Sovetunio), Hajŝenvej (la nuna Vladivostok de Sovetunio) kaj aliaj lokoj insurekciis kontraŭ la kolonia regado de la cara Rusio kaj mortigis multajn rusajn oficirojn kaj soldatojn ĉe gvatejoj. En vintro de 1871, la rusaj agresantoj, kiuj okupis la regionon Jili, intrige surprizis Urumĉi kun la intenco okupi la tutan Hingiang. La diversnaciaj loĝantoj de Hingiang saĝe embuskis kaj forte batis la agresantojn, kaj la lastaj panike rekuris al Jili.

Granda revolucia instruisto Lenin ĉiam persistadis en abolo de neegalrajtaj traktatoj truditaj de la cara Rusio al la ĉina popolo. En la jaroj 1919 kaj 1920, la Soveta Registaro gvidata de Lenin dufoje proklamis al Ĉinio majeste, ke ĝi "deklaras senvalidaj ĉiujn traktatojn kontraktitajn de la antaŭaj rusaj registaroj kun Ĉinio, rezignas la tutan kaptitan ĉinan teritorion". Limigite de la tiamaj historiaj kondiĉoj tiu ĉi proletara politiko de Lenin ne povis efektiviĝi. La starpunktoj de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko ĉiam estas distingi pravon disde malpravo en la historio, atenti la ekzistantan landliman staton kaj preni tiujn traktatojn kiel la bazon por plene solvi la landliman problemon tra intertraktado. Sed la sovetunia social-imperiismo publike perfidis la testamenton de Lenin kaj tutforte pledis por la agresado de la caroj. La novaj caroj volas okupi tiujn ĉinajn teritoriojn, kiujn la malnovaj caroj ne sukcesis okupi. Tio pruvis, ke la novaj caroj havas pli grandan agresan ambicion ol la malnovaj. Sed la epoko ŝanĝiĝis, kaj la ĉina popolo jam stariĝis. Por ĉiam forpasis la epoko de laŭplaĉa tiranado super la aliaj homoj.

## Teatrajoj kaj Filmoj

La papertondaja filmo "Ora Sovaĝansero" temas pri okazajo sur Sarĝe-stepo en Tibeto, Ĉinio. En 1959, post la likvido de la kontraŭrevolucia ribelo gvidata de Dalai-lamao, tie okazis serioza katastrofo de fiinsektoj. La amasoj streĉe batalas kontraŭ ĝi por savi la kreskajojn, kaj ankaŭ la geknaboj batas akridojn per balailoj. De malproksime venas kantvoĉo de Paldan:

*En iu malproksima tago*
*la vastan stepon trafis plago;*
*sur ĝi konsumis ĉion l' akridbandoj*
*senkore kiel brutoposedantoj.*
*Sovaĝansero ora el la oriento*
*tuj forbalais ilin vente en momento.*
*La bird' mirinda flugis tra la stepo,*
*refloris floroj kaj jubilis gregoj.*

La kanto rakontas pri mito, sed nun la mito fariĝas realo. Onklo Pasang, la partifilia sekretario de la produkta brigado diras al la geknaboj, ke la rolon de ora sovaĝansero ludos aviadilo kiu, alsendita de Prezidanto Maŭ, venos por disŝuti insekticidon.

La ĝojinda novajo disvastiĝas tra la stepo kvazaŭ printempa zefiro. Ekridas la paŝtistoj kaj la geknaboj ĝojkrias saltetante: Tuj alflugos ora sovaĝansero, ĝi tuj alflugos!

Kaj la novajo surprizas du fiulojn: la reakcian eksbrutoposedanton Ĵinĉen, kiu kaŝis sian devenon, kaj

# "Ora Sovaĝansero"


la reakcian estintan ĉefon Ŭangĉen, kiu sin kaŝas en montkaverno. Ili koluzie intrigas por konfuzi la amasojn per superstiĉaj ideoj, subfosi la konstruadon de provizora aerodromo kaj malhelpi la surteriĝon de la aviadilo.

Por konstrui aerodromon, estas necese forhaki surlokan sutro-stangon, kiu malhelpas la surteriĝon kaj flugon de aviadilo. Efektive temas nur pri ordinara ligna stango sur herbejo, tamen la reakcia eksbrutoposedanto diras, ke ĝi estas transformaĵo de budho. Paldan kaj liaj kamaradetoj interkonsentis kune iri al la sutro-stango por ĝin forhaki. Informiĝinte pri tio Ĵinĉen instigis avinon Kjuidga deteni la geknabojn. Ĵinĉen diris minace al Paldan: "Tio estas stango de fatalo. Antaŭ dek jaroj, via patro kaj avo Kjuidga ofendis ĝin kaj per tio kolerigis la budhon kaj sekve de tio la tuta stepo estis plagita. . ." Ĉu vere? Avino Kjuidge dolore rememoras la pasintaĵon.

Antaŭ dek jaroj, insektoj plagis la stepon. Avo Kjuidga kaj la patro de Paldan bruligis fajron por forpeli la insektojn. Sed neatendite la flamo pelata de vento forbruligis sutro-stangon. Ĉefo Ŭangĉen atribuis la plagon al ilia peko ofendi la diajn insektojn kaj la budhon. Li hakmortigis la patron de Paldan per glavo kaj mortigis avon Kjuidga trenante lin per galopanta ĉevalo.

Aŭdinte la akuzon de la avino, la geknaboj eklarmas kaj forte indigniĝas. Dank' al la eksplikado kaj helpo de aliaj avino, Kjuidga ekkomprenas, ke la ĉefo nur trompis kaj tiranis la paŝtistojn, kaj ŝi mem indigne forhakas la sutro-stangon.

Finkonstruiĝis la provizora aerodromo. Geknaboj nun starigas signalajn flagojn sur herbejo por gvidi la aviadilon en dissutado de insekticido. Nesukcesinte malhelpi la forhakon de la sutro-stango, fiulo Ĵinĉen ŝtele delokas la signalajn flagojn. Tion rimarkinte, Paldan tuj sendas kamaradeton por raporti tion al onklo Basang, kaj li postsekvas lin kun Daba ĝis la montkaverno.



*Reĝisoro kaj filmistoj en diskutado pri la farota filmo*

En la kaverno la reakcia ĉefo Ŭangĉen interparolas kun Ĵinĉen kaj li petas la lastan meti prokrastan bombon en tekruĉon por detrui la aviadilon je ĝia surteriĝo ŝajnigante prezenton de laktoteo. Tion subaŭskultinte Paldan kaj Daba tuj volas reiri por averti, sed ili estas jam rimarkitaj de Ŭangĉen kaj tiu ĉi tiel forte batas ilin, ke ili ambaŭ svenas. Jen aŭdiĝas galopado de ĉevalo. Vidante la danĝeron Ŭangĉen volas forkuri, sed estas jam malfrue kaj li estas kaptita en la kaverno. Rekonsciiĝinte, Paldan saltas sur ĉevalon kaj galopas al la aerodromo.

Sin kaŝante en homamasoj Ĵinĉen proksimiĝas al la aviadilo. Apenaŭ li estas metinta la kupran tekruĉon sub ĝia flugilo, algalopas blanka ĉevalo. Paldan laŭte krias al la homamasoj: "Bombo en la kruĉo!" Kaj li sin klinas, levas la kruĉon kaj forkuras de la aerodromo sagrapide. Tion vidinte, onklo Pasang tuj postkuras lin rajdante, transprenas de li la kruĉon kaj ĝin jetas en valon. Aŭdiĝas bruego kaj la intrigo de la malamikoj fiaskis.

La "ora sovaĝansero" elsputas striojn da blanka nebulo de insekticido super la verda stepo. . .

La brava knabo Paldan kaj onklo Pasang alte staras sur ĉevaloj supre de rokmuro.



*Filmado*

La "Ora Sovaĝansero" estas belarta filmo farita laŭ la formo de papertondaĵo. Ĝi estas kreita surbaze de la ĉinaj tradiciaj artoj de papertondaĵo, fenestra papertranĉaĵo kaj pupteatraĵo de ledfiguraj ombroj. La tondaĵoj estas ĉefe el koloraj paperoj kaj kelkfoje el silka aŭ kotona ŝtofo. Unue oni faras desegnojn de figuroj de homoj kaj bestoj kaj de pejzaĝoj, kaj poste gluas kaj eltondas ilin.

*Projektado de homfiguroj*



La homfiguroj en la filmo estas tiel faritaj el kartono, ke iliaj membroj, kapo, okulgloboj ktp. estas libere moveblaj artikigite. Ankaŭ la dekoracio kaj la objektoj en ĝi estas faritaj el kartono. Kaj ĉio tio estas kunmetita, manipulata kaj fotata de homoj paŝon post paŝo laŭ la intrigo de la filmo.

En la ĉinaj filmoj de papertondaĵoj en stilo kun forta folklora tradicio estas aplikata ankaŭ la arto de lignogravuraĵoj kaj ĉinstilaj pentraĵoj. Ili karakteriziĝas per okulfrapaj figuroj, takto serena kaj movoj lakonismaj.

La intrigo de la filmo "Ora Sovaĝansero" estas facile komprenebla por la geknaboj kaj ĝia esprimmaniero estas tre viveca. Ĝi estas varme akceptita de la geknaboj.

## Kurantaj Aferoj

### AŬTOMATA SPEKTRA KOLORMEZURILO

Teknikistoj de la Tekstila Instituto de Tiangin sukcesis fari la unuan aŭtomatan spektran kolormezurilon de nia lando. Ekspertizo konstatis, ke la teknikaj normoj de tiu instrumento atingis la internacian nivelon de samspecaj aparatoj. Ĝi estas pli simpla, pli facile farebla, pli malmultekosta kaj havas pli stabilan funkcion kaj pli altan precizecon, kompare kun la du-lumfaska aparato nun vaste uzata eksterlande.

Spektra kolormezurilo estas vaste uzata en industrio kaj agrikulturo. Ĝi povas mezuri la diferencojn kaj brilecon de koloroj kaj malpuraĵon en farboj. Mezurado, analizado kaj kalkulado de koloroj pri teksaĵoj per tiu aparato povas plibonigi tinkturajn receptojn kaj simpligi la specojn de farboj.

### AERFOTOGRAFADO PRI ĜOLMOLANGMA

Ĉinaj sciencistoj kaj fotistoj kvinfoje flugis trans la monton Ĝolmolangma kun alteco de 8.848.13 metroj kaj akiris grandan kvanton da koloraj fotoj kaj filmoj pri la tiea geografia pejzaĝo tre valoraj por scienca esplorado. La akirita materialo havas grandan valoron por pliapaŝe studi la geologion, geomorfologion, glaciriverojn, karakterizaĵojn kaj la leĝon de la dislokiĝo de la flaŭro.

La aerfotografado pri la natura geografia pejzaĝo de la plej alta parto de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, la areo de Ĝolmolangma, estas farita subtenate de nia amika najbaro Nepalo.

### RIMEDO KONTRAŬ RIZPIRALIDOJ

Laborantoj de la Zoologia Instituto de Junnan-provinco kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kune eltrovis biologian rimedon kontraŭ rizpiralidoj.

Rizpiralido estas feroca kaj malfacile ekstermebla fiinsekto kontraŭ rizplantoj. Longe en la pasinteco oni uzis tre venenan insekticidon por ĝin ekstermi, sed tio alportis grandan malbonan reakcion.

Post trijara eksperimentado, oni sukcesis trovi en rizpiralido novan specon de bakterio, nome "bakterio 17-1". Per pulvoro produktita de tia bakterio kaj enmiksita dekono da ordinara insekticido oni povas ekstermi 75-96% de rizpiralidoj. Tia bakterio ankaŭ povas esti uzata por ekstermi aliajn fiinsektojn.


### NOVA FERVOJA STACIO ĈANGŜA

Alia moderna granda fervoja stacio de Ĉinio, la nova stacio de Ĉangŝa, sukcese finkonstruiĝis post dudekdu-monata konstruado kaj komencis funkcii antaŭvespere de la Unua de Julio.

La totala areo de tiu stacio estas nur iom malpli granda ol tiu de la Pekina Stacio. Ĝi estas impone bela kun vasta placo. Supre de la ĉefkonstruaĵo de la stacio staras alta horloĝa turo kaj torĉo, kies pinto distancas de la tero pli ol 60 metrojn.

La nova stacio ĉiutage ekspedas, akceptas kaj trapasigas 36 pasaĝerajn vagonarojn. Ĝi pretigis bonan kondiĉon por internaciaj amikoj kaj enlandaj popolanoj veturantaj al la hejmloko de Prezidanto Maŭ por vizitado kaj havas gravan signifon por garantii glatan trafikadon de la trunkaj fervojaj linioj Pekino — Kantona, Hunan — Guanghi-a, Ĝe-





giang — Gianghi-a kaj Hunan — Gujĝoŭ-a kaj progresigi la industrian konstruadon de Hunan-provinco.

## 800,000-OBLA ELEKTRONA MIKROSKOPO

Lastatempe estas sukcese produktita en Ŝanhajo la unua 800,000-obla elektrona mikroskopo projektita de Ĉinio kaj farita el niaj propraj materialoj. Ekspertizado de koncerna fako de la ŝtato konstatis, ke ĝi atingis ĉiujn projektajn normojn. Ĝia distinga kapablo estas 2 anstromoj, ĝia akcela tensio estas 120 kilovoltoj kaj ĝia grandiga povo estas 300—800,000-oblo. Ĝi atingis la internacian avangardan nivelon de samspecaj produktaĵoj en la sepdekaj jaroj.

En esploroj de medicino, biologio, metala fiziko, duonkonduktiloj, geologio ktp. necesas mikroskopoj de grandaj precizeco kaj distinga kapablo, por observadi la strukturon de ĉeloj kaj molekuloj. 800,000-obla elektrona mikroskopo ĝuste taŭgas por tio.

## RAPIDA MULTIĜO DE ŜAMAŬ-KAPROJ

La ĉefa bredejo de Ŝamaŭ-kaproj, Ĝongvej-gubernio de Ninghia, rapide multigis la nombrojn de kapridoj.


Tiu bonrasa kapro estas elkulturita de laborantaj popolanoj en longa tempo. Ĝi liveras ĉefe bonkvalitan felon blankan aŭ nigran kun lanoj longaj, ondaj, molaj, lozaj kaj silke brilaj. Peltaĵoj el tia felo estas varma, eleganta kaj fortika.

Nun, la nombro de Ŝamaŭ-kaproj bredataj de Ĝongvej-gubernio estas kvaroblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. En la lastaj kelkaj jaroj la gubernio liveris pli ol dekmil kaprojn al aliaj lokoj de la lando por reformi tieajn kaprojn.

## NOVA REKORDO EN PUTOBORADO

La 7001-a Putobora Taĉmento de la Siĉuan-a Petrola Administrejo sukcese boris prospektoran puton kun profundeco de 7058 metroj, je 1047 metroj pli profundan ol tiu borita de la 7002-a Putobora Taĉmento en la pasinta jaro, kaj kreis novan rekordon de nia lando en borado de profunda puto.


Tiu sukceso havas gravan signifon por akiri geologian materialon pri la Siĉuan-a Baseno kaj pli bone koni la konservon de petrolo kaj gaso. Samtempe, dank' al la borado de tiu puto akumuliĝis pli multe da sperto pri venko de alta temperaturo, alta premo kaj komplika geologia stato en profundaj stratumoj. Tio ankaŭ havas gravan signifon por reformi la teknikojn de putobora koto, mezurado, registrado kaj fiksado de puto kaj elpreno de roko, kaj por akceli la geologian esploradon kaj prospektoradon de petrolo.



# GEOLOGIAJ PIONIROJ



La 15-a Geologia Taĉmento de Kinghaj faras mezuradon sur monto je 6,000 metroj alta super la mara nivelo.



La Nangiang-a Hidrologia Taĉmento de Siĉuan faras esploradon en kaverno por trovi akvofonton. mfw mfw mfw mmmb



Geologiaj esplorantoj de Daking-olekampo serĉas petrolon en profunda stratumo per gasmezura instrumento.






Tibetanaj kaj han-aj laborantoj de la Fiziko-prospektora Taĉmento de la Tibeta Aŭtonoma Regiono serĉas termikajn fontojn por la patrolando tra la altebenajo.

Ĉina eminenta geologo Li Siguang observas la geologian strukturon en montregiono de Janking-gubernio de Pekino.



Teknikistoj de la 15-a Geologia Taĉmento de Kinghaj kolektas rokajn specimenojn.





Teknikistoj kaj laboristoj de la 1243-a Putobora Taĉmento kune esploras ŝablospecimenon prenitan el puto sur la Tibeta Altebenaĵo.



La 322-a Geologia Taĉmento de Anhuj en laboro.

# La ĝino-oj en antaŭenmarŝo

La ĝino-oj koncentre loĝas sur Ĝino-montregiono en la Hiŝuangbanna-a Taj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Junnan-provinco. Ilia totala nombro estas pli ol 8,000. En tiu montregiono estas densaj primitivaj arbaroj, la klimato estas milda, la grundo fekunda kaj la precipita kvanto sufiĉe granda. Sub la kruela subpremado de la reakciaj regantaj klasoj antaŭ la Liberiĝo, la ĝino-oj longe restis en postiĝinteco de primitivaj agrikulturo kaj kulturo. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la brila nacia politiko de Prezidanto Maŭ, la ĝino-oj fariĝis mastroj de la ŝtato. Ili konstruis irigaciajn kanalojn kaj kampojn sur-monte, reformis la kultivadon kaj entreprenis multajn flankokupojn. Surbaze de disvolvado de la produktado, ili starigis lernejojn kaj sanprotektajn instituciojn kaj ilia vivnivelo senĉese altiĝis. Ili estas farantaj kontribuon por konstrui novan socialisman montregionon.




Ĝino-aj geknaboj en lernado.



Gelernantoj aŭskultas klarigadon de komunumano pri plantado kaj flegado de bonspecia rizo.

Ĝino-a amatora arta taĉmento faras prezentadon al komunumanoj.






Baj Lalej, unu el la unuaj ĝino-aj diplomitoj el medicina altlernejo.



Ĝino-oj prikantas sian novan vivon.

# OBJEKTOJ EL TOMBO DE
# SKLAVOMASTRO DE




Jadaj elefantoj

Jada homo.



Ebura pokalo




# JIN-DINASTIO



Bronza dingo-o.



Bronza kruĉo en formo de pandiono por kulta ceremonio.



Jada pelvo.






Sespieda bronza varmigi!o.

Bronza vinujo.



# "ORA Sovaĝansero"






Malgranda heroo Paldan.




"En iu malproksima tago. .




"La rolon de ora sovaĝansero ludos aviadilo alsendita de Prezidanto Maŭ por ekstermi la fiinsektojn."



Kolektado de neĝlotusoj por bonvenigi la karulojn.



Reakciaj eksbrutoposedantoj intrigas malhelpi la surteriĝon de aviadilo.



Paldan kuras for de la aerodromo kun la kupra kruĉo en kiu troviĝas prokrasta bombo.



6611

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

世界语《中国报道》一九七七年第十期（本刊代号：二——九一五